der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

22. Jahrgang Nr. 137 (3/1986) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Pacrenkontiĝo en Volgograd

Kvin tagojn en aprilo — la 8an ĝis la 12an 1986 — kolektiĝis en la sovetia urbo Volgograd pli ol 300 geesperantistoj el 15 landoj. Pli of 270 venis el pli ol 50 urboj de Sovetunio al la somere varma urbo ĉe la Volga, la aliaj alvojaĝis de eksterlando, invititaj de la MEM-sekcio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Estas simbole, ke la MEM-aktivuloj renkontiĝis por interŝanĝi siajn spertojn en la internacia pacbatalo en tiu urbo de la herooj, kie okazis unu el la plej sangaj kaj plej longaj bataloj de la dua mondmilito, la decida batalo de la milito. „Tiu ĉi batalo decidis la sorton de nia lando", diris la vicprezidantino de la ekzekutivo de la Volgograda urbsoveto A. S. Marsakova. Ŝi alparolis la kunvenintojn komence de la malferma kunsido kaj esprimis grandan estimon por la pacagado de la esperantistoj. La salutojn de la sovetiaj pacbatalantoj transdonis la prezidanto de la regiona komitato por la defendo de la paco, Dr-o de la medicinaj sciencoj Prof. W. G. Karpenko. Ni partoprenantoj de la pacrenkontiĝo vizitantaj monumentojn de la granda batalo — monumenton sur la Mamajew-Kurgan, monumenton de la nekonata soldato kaj la Panorama-Muzeon de la Stalingrada batalo — sentis la devon kunagadi en la plenumo de la testamentaĵo de tiuj herooj — konservi la pacon, kiun ili pene akiris por ni en la lukto kontrau la faŝismo. Honore al la herooj ni metis florkronojn antaŭ la momunentojn.

La diskutadon en la plenkunsidoj partoprenis 31 parolantoj, inter ili Nikola Aleksiev, Honora Prezidanto de MEM, Imre Pethes, Prezidanto de MEM, Clement Tholet, Ĝenerala Sekretario de MEM, Prof. Isajev, prezidanto de ASE, Joshimo Umeda, vicprezidanto de UEA kaj iniciatoro de la Tago de Paco en kadro de la UEA-kongreso 1985, Dao Anh Kanh, prezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-asocio, Włodzimierz Wesołowski, prezidanto de PEA, Dr. Andrej Lukáč, prezidanto de SEA, Hans Heinel, prezidanto de GDREA, Franz Schick, redaktoro de „Internaciisto" kaj MEM-reprezentantoj el ČSSR, Hungario, Bulgario, Jugoslavio, Usono, Kanada, Granda Britio kaj el diversaj sovetiaj respublikoj.

Riĉan trezoron da spertoj peris al ni sovetiaj delegitoj. Ili raportis pri la kontribuo al la propagando de realisma bildo pri la socialismo en Sovetunio, pri la disvastigo de ideoj de la sovetia MEM-sekcio. Nun estas intensigata la kunlaboro de la esperantistoj en la ĝemelurbaj rilatoj. Ekzemple reprezentantino de la esperantistoj el Leningrad raportis, ke de la 22 gemelurbaj rilatoj de Leningrad la esperantistoj Kunagadas en 12 gemelurbaj rilatoj. Laŭ la kontrakto inter ASE kaj GDREA ja ankaŭ GDR-esperantistaj grupoj jam uzis tiun eblecon. La prezidanto de nia asocio aprezis en sia parolado la amikan kunlaboron de sovetiaj kaj GDR-esperantistoj sur-

baze de tiu kontrakto kaj distingis la prezidanton de ASE, Prof. Magomet Isajev, per la honorinsigno de GDREA pro lia elstara kontribuo al la preparo kaj efektivigo de tiu čiu kontrakto.
Apartan aplaŭdon Hans Heinel ricevis por sia konstato, ke ne ekzistas ia bezono protesti kontraŭ politiko de sia registaro aŭ de la sovetia registaro, čar tiuj ĉi registaroj efektivigas porpacan politikon.
Grandan rolon dum la tuta pacrenkontiĝo ludis la plej novaj pacproponoj deklaritaj de M. S. Gorbaĉov kaj la stimuloj de la 27-a partikongreso de KPSU por paco kaj malarmado.

Spite al diversaj opinioj kaj mondkonceptoj, kiuj videbliĝis dum la diskutado, ĉiuj partoprenantoj esprimis konsenton kun tiuj stimuloj, tiuj ĉi proponoj. Des pli forta estis la indigno, kiam Imre Pethes informis nin dum la renkontiĝo pri la nova nuklearmila

D. A. Perevalov transdonas al prof. W. G. Karpenko broŝuron kun paroladoj de M. S. Gorbaĉov tradukitaj en Esperanto. Sidas (de dekstre) d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, prof. d-ro Magomet I. Isaev, prezidanto de ASE.

testo en Usono. Tiumomente verŝajne multaj partoprenantoj rememoris pri du kontribuaĵoj de la antaŭa diskutado. La japano Joshimo Umeda estis priskribinta siajn travivaĵojn kiel 15-aĝulo en la jaro de la faligo de la du atombomboj super Hiroshima kaj Nagasaki kaj estis espriminta sian miron, ke US-amerikaj studentoj diris al li, ke la faligo de la atombomboj estis „necesa malbono". Imprese estis rakontinta Vasja Cvetkova, la sekretariino de MEM, pri renkontiĝo kun viktimo de atombombo dum vojaĝo en Japanio kaj pri ŝiaj travivaĵoj je la 9a de aŭgusto en 1945, tiam 20-jaraĝa.
Per la sciigo el Usono tiu ĉi rememoro ricevis specialan signifon.

La renkontiĝo kun homoj, kiuj proprasperte konas la terurajn sekvojn de milito kaj armado, estis dum tiu renkontiĝo grava instigo serĉi rimedojn por efika kunlaboro por paco kaj malarmado. Multspecaj spertoj estis diskutitaj. Reprezentantoj el kapitalismaj landoj ekzemple emfazis, ke ilia batalo por paco estas ligita kun batalo kontraŭ antaŭjuĝoj pri homoj en socialismaj landoj kaj ligita kun batalo kontraŭ antisovetismo kaj antikomunismo.
La renkontiĝo kulminis en decido pri apelo, sed la plej grava rezultato estas la multaj impulsoj, kiujn la partoprenantoj kunprenis hejmen.
ASE kaj Unio de Sovetiaj Organizaĵoj

de Amikeco (SSOD) meritas dankon por la preparo kaj efektivigado de tiu pacrenkontiĝo. Montriĝis dum tiuj 5 tagoj ankaŭ la kreskita kvalito de la laboro de ASE aŭ en diskutado aŭ en kulturprogramoj de kulturgrupoj esperantistoj diversspecaj kaj el diversaj sovetiaj respublikoj.

Dankon ankaŭ meritas la urbo Volgograd, kies urbestro akceptis la MEM-delegitojn el la diversaj landoj en la urbdomo. Tiu urbo nove estiĝis per admirinde diligenta laboro de siaj enloĝantoj. Ĝi estis bona gastiganto, donis bonajn kondiĉojn pro sukcesa laboro de la MEM-aktivuloj kaj atentis pri nia pacrenkontigo.

La Volgograda Pravda ĉiutage raportis pri ĝi. Nun ni pravigu la konfidon kaj agadu en la spirito de tiu ĉi pacrenkontiĝo kiel parto de la mondpaca movado.

Fritz-J. Wollenberg

APELO el Volgograd

Ni, la partoprenantoj de la Internacia Renkontiĝo „Esperantistoj por la paco kaj malarmado" (Volgograd, 8 - 12. 4. 1986), dediĉita al la Internacia Jaro de Paco, — esperantistoj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Pollando, Rumanio, Usono, USSR, Vjetnamio, kunvenintaj sur la multsuferinta tero de la urbo-heroo, kie okazis la kruela Stalingrada batalo, sojle de la 25-jara jubileo de la unua flugo de la homo en la kosmon, en la Internacia tago de memoro pri la viktimoj de la faŝismo, deklaras nian subtenon al la programo de malarmado, proponita de Soveta Unio, kaj apelacias al ĉiuj esperantistoj, al ĉiuj pacamontoj en la mondo, sendepende de rasa, nacia, religia kaj socia apartenoj, ankoraŭ pli aktive batali kontraŭ la danĝeregaj planoj pri militismigo de la kosmo, kontraŭ la nuklea kaj ĉiu alispeca vetarmado, streĉi la fortojn por plene likvidi la nuklean armilaron, grave redukti la aliajn specojn de armiloj kaj armitajn fortojn kaj establi la sistemon de la universala sekureco, la fidinda paco sur nia planedo.

Ni esprimas nian nereteneblan indignon pro la nova eksplodigo de la nuklea bombo, kiun la 10-an de aprilo efektivigis la usona registaro spite de la bona volo, esprimita de Soveta Unio, kiu unuflanke deklaris la moratorion pri ĉiuj nukleaj eksplodigoj kaj denove daŭrigis ĝin ĝis la unua sekva usona eksplodigo post la 31-a de marto 1986.

Ni alvokas ĉiujn pacamantojn insisti antaŭ Usono, ke ĝi aliĝu al la moratorio kaj komencu traktadon kun la ceteraj nuklehavaj ŝtatoj pri plena likvido de nukleaj armiloj kaj ĉiuj aliaj rimedoj por amasa ekstermo.

Pactago en Poprad

La 2an de majo 1986 Esperanto-Asocio organizis en Poprad solenan aranĝon okaze de la Internacia Jaro de Paco. Partoprenis ĝin la membro de la Centra Estraro de GDREA kaj de la Internacia Komitato de MEM, Ingrid Schödl.

Pri SAT kaj IPE en Dietz-eldonajo

En la eldonejo de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SUPG), Dietz-Verlag, Berlin, aperis 1986 la 868-paĝa libro „Geschichte der internationalen Arbeiterbewegung in Daten" (Historio de la internacia laborista movado en datoj). Ĝin pretigis kolektivo de sciencistoj laborantaj ĉe la Instituto por Marksismo-Leninismo ĉe Centra Komitato de SUPG. La siaspece unika libro prezentas datojn ekde 1760 ĝis 1982. Por ĉiu dato oni trovas koncizan artikolon donanta la plej gravajn informojn pri la evento fiksita sub la koncerna dato. La libro havas jenajn registrojn, a) geografiaj nomoj, b) personoj, c) internaciaj organizajoj kaj movadoj, d) naciaj kaj teritoriaj organizajoj kaj movadoj, e) periodajoj, f) mallongigoj.

En la libro oni trovas koncizajn sed fakto-ĝustajn artikolojn pri „Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT), p. 208 kaj „Internacio de Proleta Esperantistaro" (IPE), p. 292. La organizajojn oni trovas en la koncerna indekso (p. 822, 829 „Weltbund der Arbeiter-Esperantisten" por SAT). En la periodaja indekso troveblas la revuoj „Internaciisto" (855), „Sennaciulo" (856), „la nova epoko" (208), same la mallongigoj IPE (p. 862) kaj SAT (865).

D. B.

3 broŝuroj de Gorbaĉov

La gazetara agentejo Novosti daŭrigas la eldonadon de politikaj dokumentoj en Esperanto. Aperis 1986 la „Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov 1986-01-15" (14 p.), temas pri la gravegaj proponoj likvidi ĝis la jaro 2000 ĉiujn nukleajn armilojn.

La dua broŝuro estas „Respondoj de Miĥail Gorbaĉov al demandoj de la ĵurnalo" L'Humanité (24 p.) kaj la tria estas la ege interesa kaj grava „Politika Raporto de Centra Komitato de KPSU al la 27a Kongreso de la partio". La 150paĝa broŝuro entenas la politikan raporton, la konkludan paroladon de M. S. Gorbaĉov kaj la rezolucion de la kongreso.

KOMUNIKO

En Poprad, Ĉeĥoslovakio, de la 20-a ĝis la 26-a aprilo 1986 kunvenis reprezentantoj de E-organizaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio. Oni pridiskutis la akualan mondsituacion kaj unuanime oni esprimis decidan subtenon al la propono de Sovetunio pri iom-post-ioma likvido de nukleaj armiloj ĝis la fino de la 20-a jarcento.

La kunvenintaj reprezentantoj rekomendis al ĉiuj SLEO-j konigi al la monda esperantistaro sian firman volon kunlabori kun diverstendencaj esperantistoj por konservo de la monda paco, kontraŭ militarigo de la kosma spaco.

La kunvenintoj alvokas al plibonigo kaj pliaktivigo de la laboro por la apliko de Esperanto en profesiaj kaj sciencaj rondoj.

La Konsultiĝo proponas al SLEO-j kaj al čiuj esperantistoj organizi solenaĵojn lige kun la centjara jubileo de Esperanto, utiligante tiucele ankaŭ la Rezolucion de UNESKO el 1985.

La 100-jara jubileo devus helpi al SLEO-j en la varbado de novaj adeptoj de Esperanto, kreskigo de la membraro de E-asocioj, precipe el junularaj medioj.

La kunvenintoj esprimas sian firman konvinkon, ke la venontjara jubilea UK en Varsovio fariĝos brila manifestacio de la unueco kaj pacamo de la monda esperantistaro.

La partoprenantoj esprimas sian dankon al SEA pro la kreo de bonegaj laborkondičoj de la Konsultiĝo.

Poprad, la 26-an de aprilo 1986
Partoprenantoj de la 19-a
Konsultiĝo de SLEO-j

Amika etoso en Poprad

La 19a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj okazis en la nova ĉefsidejo de Slovakia Esperanto-Asocio en Poprad. Kiel kutime la programo estis tre plena. La slovakaj gastigantoj sukcesis krei tre bonajn laborkondiĉojn en sia domo, malnovstila sed bonege restaŭrita. Ekzistas la plano transpreni ankoraŭ du domojn, por kiuj la ŝtato certigas la rekonstruon kaj restaŭron. La prezidanto de SEA, d-ro A. Lukáč kaj la motoro de SEA, Milan Zvara kun multaj kunlaborantoj kaj helpantoj donis bonegan ekzemplan pri la solida laboro de la slovakoj. La asocio jam havas 3 000 membrojn, tute modernigitan revuon (redaktas Stano Marĉek), internaciajn kaj naciajn kursojn kaj tre senteblan subtenon flanke de la lokaj instancoj.

Al la kadra programo de la konsultiĝo apartenis renkontiĝo kun reprezentantoj de la orientslovakokomitataj aŭtoritatuloj kaj kun lokaj reprezentantoj de la kultura vivo, renkontiĝo kun ĵurnalistoj, prezento de bonega akordiona koncerto kaj de pupteatra spektakleto, dancvesperoj kun la ĉeha Country-muzikgrupo „Barbuloj", prezento de diapozitivoj pri pasintaj konsultiĝoj, tuttaga ekskurso tra la naturprotekta regiono de Pienino-montaro kun la rivero Dunajec k. a.

Sendube ankaŭ tiu ĉi konsultiĝo tre helpis al la spertinterŝanĝo kaj la plibonigo de la kunlaboro de la partoprenintaj asocioj. **D. B.**

Broŝuro pri bulgaraj sindikatoj

Nikola Aleksiev estas unu el la fondintoj de la komunisma bulgara movado kaj pro tio ne mirigas, ke li havas

apartan ligon al la sindikata movado. Tion montras i. a. la fakto, ke li tradukis kelkajn paroladojn de Petro Djulgerov, prezidanto de la Centra Konsilio de Bulgaraj Sindikatoj. „La paco kaj la sindikatoj" nomiĝas la 48paĝa broŝuro, kiun eldonis 1985 la Centra Konsilio de Bulgaraj Sindikatoj. La broŝuro entenas la enkondukan paroladon de Djulgerov antaŭ la Internacia Sindikata Renkontiĝo-Dialogo „La Paco kaj la Sindikatoj", kiu okazis 1983 en Sofio kaj krome paroladon okaze de la okdekjariĝo de la revolucia sindikata movado en Bulgario. La traduko de Nikola Aleksiev legiĝas flue kaj bone.

Ĉina Esperanto-vespero kun ĉina gasto

Lige kun la okazigo de la Universala Kongreso en Pekino la loka Esperanto-klubo en Karl-Marx-Stadt aranĝis tre interesan grupvesperon pri Ĉinio. Pli ol 50 esperantistoj kun profunda emocio kaj granda ĝojo bonvenigis karan gaston el Pekino: samideaninon Zhou Qianyun. S-ino Zhou venis kiel kunlaborantino de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) al la Printempa Foiro de Leipzig kaj tre bele prizorgis la ĉinan libro-standon.
Post tre bela lumbilda prelego pri Pekino sinjorino Zhou respondis al multaj demandoj pri la vivo en ŝia lando en modele prononcita kaj perfekta Esperanto.
El donacoj de Guoji Shudian, de Ĉina Esperanto Eldonejo, de Radio Pekino kaj el posedaĵoj de lokaj esperantistoj estis aranĝita granda ekspozicio de ĉina Esperanto-literaturo kaj ĉinaj Esperanto-gazetoj, de folkloraj objektoj kaj ĉinaj esperantaĵoj. En filatela ekspozicio estis dokumentitaj multaj faktoj el la historio de Esperanto en Ĉinio. Oni povis vidi paĝojn pri Lusin, Verda Majo, pri la agado de Pandiŝo 1923 por „La Verda Lumo", pri la eldiro de Mao kaj pri la partopreno de ĉinaj proletaj esperantistoj en la revoluciaj bataloj en 1939.
Kun ĝojo ankaŭ estis akceptitaj la salutleteroj de Radio Pekino kaj de la ĉinaj esperantistoj Song Shengtan, de Wei Shan, de Liang Ke kaj de Cui Haijing. Tiel skribis ekzemple Song Shengtan: „... Kiam mi lernis en la universitato, mi legis Goethe, Schiller, Heine, Heinrich kaj Thomas Mann ... Ambaŭ niaj landoj havas la saman celon: Pacon. Vivu la eterna frata solidareco inter niaj popoloj!"
Tiu či ĉina vespero estis kulmina punkto en la agado de la loka klubo kaj la čeesto de nia amikino Zhou kronis ĝin. Ni esperantistoj en Karl-Marx-Stadt tre ĝojis pri la vizito de nia amikino Zhou kaj ni el tuta koro dankas al Guoji Shudian kaj al la Ĉina Esperanto Ligo, kiuj ebligis ŝian viziton.

burmeister

De maldekstre dekstren: Rudolf Burmeister, prez. de DE GDREA Karl-Marx-Stadt, s-ino Zhou Qianyun, Hans Heinel, prez. de GDREA, Rolf Bethke, prez. de la Esperanto-grupo Karl-Marx-Stadt

El letero de Zhou Qianyun

„... Mi estas feliĉa, ke mi havis la ŝancon vidi la viglan Esperanto-movadon en Karl-Marks-Urbo kaj la čiutagan vivon de esperantistaj familioj. Estas des pli agrable por mi, ke mi persone kontaktis kun viaj grupanoj kaj faris amikecan interparolon, kio donis al mi neforgeseblan impreson. Mi devas konfesi, ke sen la kunlaboro de via asocio, sen la afabla akceptado fare de viaj geesperantistoj ne estus tiel perfekta mia vizito en Karl-Marks-Urbo. Akompanite de k-do Hans Heinel kaj aliaj simpatiaj samideanoj mi vizitis la monumenton de nia granda proletara gvidanto Karl Marks.

La sukcesa ‚Ĉina Vespero' tiel min kortuŝis, ke mi ĝis nun memoras ĉion, kio okazis en la klubejo ‚Pablo Neruda'. Bonvolu transdoni mian saluton al ĉiuj samideanoj en Karl-Marks-Urbo. Mi kredas, ke la memorindaj tagoj, kiujn ni kune pasigis en via urbo, intimigas nin, esperantistojn de la du g e o g r a f i e malproksimaj landoj ... Sincere via

Zhou Qianyun"
Direktorino de Esperanta Sekcio ĉe la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio

Kiel preleganto en Finnlando

Dum la tempo de la 8a ĝis 22a de marto 1986 mi restadis en Finnlando kiel gastpreleginto. Mi estis invitita de la rektoro de la universitato Tampere, lige kun la universitatoj de Helsinki kaj Turku, kaj prepare fare de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI). Dum mia restado en Tampere mi prelegis germanlingve pri vortfarado de Esperanto kompare al la germana lingvo en la instituto por filologio (sekcio germanistiko), pri la sciencaj aspektoj de planlingvoj en la instituto de tradukistoj (esperantlingve, finnen tradukita de Pentti Järvinen) kaj pri interlingvistiko en la esplora seminario de la lingvistikaj institutoj de la universitato (germanlingve). Pri „Esperanto-movado kaj pacmovado" mi prelegis antaŭ neesperantistoj kaj esperantistoj en la laborista instituto de Tampere (institucio komparebla al la vesperaj lernejoj en GDR), tradukita finnen de Pentti Järvinen.

En la universitato de Helsinki mi parolis pri vortfarado (germanistika instituto, germanlingve), pri planlingvoj en la instituto por instruistoj (esperantlingve, tradukita finnen de Sakari Kauppinen.). En la universitato de Turku (Instituto por tradukisto) mi prelegis pri „Sciencaj valoroj de planlingvoj" (germanlingve). La prelegojn ĉiam sekvis tre interesa kaj multflanka diskuto, kio montris seriozan ekinteresiĝon flanke de la aŭskultantoj.

Krome okazis tre sukcesa renkontiĝo kun pli ol 40 esperantistoj de Helsinki en la Kulturcentro de GDR, kie oni ankaŭ tuŝis, kvazaŭ spertinterŝanĝe, problemojn de la esperantista agado kaj menciis kelkajn eblecojn de estonta kunlaboro inter Esperanto-Asocio de Finnlando kaj GDREA.

Menciindas ankaŭ la prelegoj „Esperanto — lingvo aŭ bobelo?" en Lahti (tradukita finnen de Mia Yrttiaho) kaj pri „Berlin — ĉefurbo de GDR" en Turku.

Mi havis multajn tre utilajn kontaktojn kun lingvistoj kaj esperantistoj esperante, ke la prelegserio iom kontribuis al la klopodoj de la finnaj esperantistoj pli forte ekinteresigi finnajn lingvistojn pri interlingvistikaj problemoj ĝenerale kaj aparte pri Esperanto.

Valoras mencii, ke la edukministerio de Finnlando 1982 starigis laborgrupon, ties tasko estis ekspertizi la nunan situacion de la instruado de Esperanto en Finnlando kaj la instrubezonon de la lingvo en la plenkreskula edukado. Surbaze de la ekspertizo oni devis fari proponon pri la organizado de Esperanto-instruado en la postmezgrada edukado. En la jaro 1984 tia raporto kaj proponoj pri instruado de Esperanto estis transdonita al la edukministerio. Lige al tiuj klopodoj oni devas prepari la objektivan sintenon de la lingvistoj pri Esperanto. La tasko de la prelegserio estis, kontribui al tiu celo.

Fine necesas mencii, ke finnaj lingvistoj kaj multaj finnaj esperantistoj tre afable kaj sindediĉe kontribuis al la sukcesa realigo de la prelegvojaĝo. Aparte grava estis la persona helpo de la veteranino de la finna movado, Irja Klemola, kiu grave kontribuis al la materia bazo de la vojaĝo. La lingvisto Roland Freihoff de la universitato Tampere bonege kunordigadis la prelegojn en la universitatoj, kaj Pentti Järvinen el Tampere kunordigadis kune kun Silja Kivekäs la tutan restadon flanke de ELFI. Krom al ili apartan dankon pro la bonegaj helpoj, gastigado aŭ diversspeca subtenado la preleginto ŝuldas al siaj longjaraj amikoj Reino kaj Erkki Järvinen, plue al Hannes Jumppanen, Harri Laine,

IFER '86

Leipzig — urbo de la laborista Esperanto-movado

„Laŭ la IFER-Kalendaro ni trovigas en la 10a jaro", diris Michael Behr, la programĉefo de IFER post la malfermaj vortoj de Sabine Schulze, unua vicprezidantino de la Distrikta Estraro de GDREA en Leipzig.
Vere, jam 10 jaroj pasis post la okazigo de la unua novstila Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo en Leipzig.
Tiu 10a, kiu okazis de 14a ĝis 16a de marto 1986, havis apartan gravecon. Ĝi estis la plej granda ĝis nun okazigita. Ĝi okazis en nova moderna granda klubdomo de la Libera Germana Junularo, kie la 250 partoprenintoj el 12 landoj havis lokon. Sed plej grave, la aranĝo havis kiel ĉeftemon „Leipzig — urbo de la Laborista Esperanto-movado". Tiu temo konformis al la fakto, ke antaŭ 75 jaroj, ĝuste en Leipzig, fondiĝis la Germana Laborista Esperanto-Asocio. La ĉi-jara IFER okazis krome en la jaro de la 11a PartiaKongreso de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio kaj 100 jarojn post la naskiĝo de la prezidinto de la Komunista Partio de Germanio, Ernst Thälmann, murdita en nazia koncentrejo.

La prepara komitato de IFER faris grandegan laboron, fakte neimageblan, konsiderante, ke ĉiuj ja ne laboras monakire por Esperanto sed havas siajn profesiojn. La partoprenintoj venis el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, PR Ĉinio, Ĉeĥio, FRG, Francio, GDR, Granda Britio, Hungario, Pollando, Slovakio.

La plej longan vojaĝon sendube havis s-ino Zhou Qian-Yun, kiu venis rekte el Pekino kaj estis membro de la oficiala ĉina delegitaro al la Foiro de Leipzig. S-ino Zhou estas estrino de la Esperanta fako de la ĉina eksport-entrepreno por fremdlingva literaturo. La programo estis tre riča. Vere impresa estis la tradicia malfermo. Kvankam tradicia ĝi estis nekutime impresa. Post la bellingva saluto de Thälmannpioniroj sekvis salutparoladoj de kelkaj rimarkindaj personecoj. Al ili apartenis prof. d-ro Peter Heldt, profesoro ĉe Karl-Marx-Universitato kaj prezidanto de la Distrikta Estraro de Kulturligo. Li uzis la okazon por pere de IFER malfermi serion de gravaj aranĝoj de Kulturligo en la distrikto Leipzig, la „tagoj de kulturo kaj scienco". Prof. Heldt en sia parolado donis tre altan pritakson al la esperantista agado, kaj aparte omaĝis al la tradicioj de la laboristaj esperantistoj. Li informis, ke ankaŭ Esperanto-libroj estis inter tiuj, kiujn 1933 bruligis la faŝistoj. Walter Kresse, la iama ĉef-urbestro de Leipzig, nun prezidanto de la komunumaj parlamentoj de GDR, faris kortuŝan paroladon pri la intima ligiteco inter la politika batalo antaŭmilita kaj la kontribuo de la laboristaj esperantistoj. Multajn eminentajn LEA-anojn, kiel Otto Bäßler, kaj Walter Kampfrad, li konis persone. Krome parolis i. a. ankaŭ Ellen Rohde, distrikta konsilantino por kulturo en la okcidenta kvartalo de Leipzig — unuan fojon en Esperanto, cetere bonprononca. La malferman ceremonion oni finis per kantado de la „Internacio" en Esperanto.

La antaŭtagmezaj horoj de sabato estis dediĉita al la kadra temo. La IFER-anoj aŭskultis tre dignan omaĝan prelegon de Fritz Wollenberg.

Sakari Kauppinen, Tapio Sormunen, Jouko Lindstedt, Annikki Rannisto, Jukka Laaksonen, Esa Lång, Mia Yrttiaho, Liisi Oterma, Leena Tiusanen kaj al Prof. Heikki A. Alikoski.
Miaj impresoj akiritaj dum la dusemajna restado en Finnlando estis tre bonaj: afabla kaj tre diligenta popolo kun riĉaj tradicioj, aktive praktikanta la pacan kunekzistadon tiel donante stabiligan elementon en Eŭropo, kvankam relative malgranda tamen konscie laboranta Esperanto-movado, kaj ne laste — rava pejzaĝo kun lagoj, lagoj, lagoj (kvankam prosezone glaci- kaj neĝkovritaj). Por mi neforgesebla restado en tre simpatia lando.

D. Blanke

Sekvis prelego pri GLEA de Ino Kolbe, la filino de unu el la iniciatintoj de GLEA, Reinhold Voigt. Fritz Wollenberg poste gvidis interesan inetrvjuan forumon kun la veteranoj de la laborista Esperanto-movado Ino Kolbe, Werner Habicht, Erich Würker kaj Rudolf Eichler. La prelego kaj la forumo diskonigis multajn interesajn detalojn el la historio.

Oni krome povis spekti la litovan Esperante sinkronizitan filmon „Vivaj akvoj de Litovio".

Posttagmeze la partoprenantoj de IFER havis pluan apartan travivaĵon. Ili povis aŭskulti prelegon de s-ino Zhou pri la ĉina Esperantomovado kaj la esperantlingva ĉina literaturo.

Kiel kutime dum IFER, ankaŭ ĉi-foje kunsidis fakgrupoj de fervojistoj, poŝtistoj, komputilistoj, forstistoj kaj ĵurnalistoj. Ne mankis ĉiĉeronadoj tra Leipzig kaj al la zoologia ĝardeno kaj diaprelegoj pri Brno. Aparte bonvena estis prelego de Manfred Arnold, mem aktiva tradukisto de liriko en Esperanton, pri „Liriko en Esperanto". Travivaĵo estis la programoj de la kanzonfaristoj Józef Dinnyes el Budapest sabate vespere, kaj de Klaus Ebert el Berlin,vendrede vespere.

IFER ankaŭ havis tre bonan ehon en la amasmedioj. La gazetara konferenco sekvigis kelkajn longajn artikolojn, i. a. en „Leipziger Volkszeitung" (14. 3. 1986) „Leipzig — lulilo de la germana laborista Esperantomovado". Krome okazis kelkaj radiointervjuoj kun stacioj de GDR, ne parolante pri tio, ke la amiko de IFER, Andrzej Pettyn, kun sia stabo en Radio Polonia amplekse raportis.

IFER '86, kaj jam en antaŭaj jaroj, tre modele montras, kiel oni en alta kvalito kaj atrakcio povas realigi la program-direktivojn de GDREA. Bonega kulturpolitika kaj faka laboro, kiun oni dankas al relative malgranda kolektivo, inter ili aparte Rolf Beau, Michael Behr, Sabine Fiedler, Ino Kolbe, d-ro Erich-Dieter Krause, Joachim kaj Sabine Schulze kaj aliaj, ne forgesante kelkajn „importojn" el la „nelajpcigaj distriktoj".

Kompreneble la IFER-kolektivo jam preparas IFER '87. Gi okazos, sub same bonegaj kondiĉoj, kun la kadra temo „100 jaroj Esperanto — lingvo de interpopola kompreniĝo". Vi ankoraŭ neniam partoprenis IFER? Via perdo! Almenaŭ provu 1987, petante informojn ĉe Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband (IFER-Komitato), Käthe-Kollwitz-Str. 115, Leipzig, DDR - 7010. **Ed. Refi**

OFICIALA KOMUNIKAĴO
de la Organiza Komitato de IFER '87

La Organiza Komitato de la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER) okazigos la aranĝon en 1987 de la 13a ĝis la 15a de marto en la foira urbo Leipzig, kiu estas la dua urbo laŭ grandeco de la Germana Demokratia Respubliko.

La IFER-OK,

konsiderante la gravan fakton, ke en 1987 la mondo solenos la centjariĝon de la lingvo Internacia,

elektis por la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1987" la ĉeftemon „Cent jaroj de Esperanto — LINGVO de INTERPOPOLA KOMPRENIĜO",

volante diskonigi la grandajn eblecojn, kiuj estas donitaj per Esperanto al la homaro, invitas ĉiujn intersiĝantojn al tiu internacia aranĝo,

intencas elmontri ankaŭ al ne-esperantista publiko la atingajojn, avantaĝojn kaj aplikon de la Lingvo Internacia, speciale en la fakaj branĉoj, menciitaj en la ĉeftemo,

atendas vere internacian partoprenantaron el multaj landoj de nia terglobo,

gastigos 250 geesperantistojn dum la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1987"

aperigos meze de la 1986a jaro ampleksan bultenon, kiu entenos čiujn kondiĉojn de partopreno.

Jam nun eblas ntaŭmendi ĉi tiun bultenon! La mendintoj ricevos tiun plurpaĝan informilon senpage tuj post ties apero. Ĉar la IFER-aranĝoj ĝuas sufiče grandan rekonon inter la esperantistaro, estas rekomendinde tre frue aliĝilon ĉe la Organiza Komitato.

Limdato por aliĝo estos la 31a de januaro 1987. [daŭrigo p. 57]

Nova scienca periodaĵo en Ĉinio

En januaro trafis nin la numero 1985/1 de la nova kvaronjara revuo „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" eldonata de la „Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj".

La nova revuo estas dulingva, ĉina kaj Esperanta. La tuta amplekso de la menciita numero estas 48 paĝoj + kovrilo. La numero enhavas kelkajn citaĵojn kaj skribaĵojn pri la rolo de Esperanto ĝenerale kaj precipe en la sciencoj, kelkajn informojn pri E-kursoj aranĝitaj por sciencistoj, kelkajn novaĵojn pri la aplikado de Esperanto, por sciencaj celoj en la mondo (ekz. informojn pri Interkibernetik '85 en Budapeŝto). Inter la sciencaj artikoloj troviĝas temoj pri la vegetala fiziologio, la genetika inĝenierarto, la evoluo de aŭtomatigo, la tutmonda nutraĵproblemo. Popularsciencaj informoj pri kelkaj interesaĵoj, trilingva komputila vortareto, leteroj de legantoj kaj informo pri abonado kompletigas la enhavon.

Ni gratulas pro la nova iniciato kaj deziras sukcesan evoluon.

Dr. Ottó HASZPRA

Mongola helpo ofertata

La mongola esperantisto Ts. Batzaya, post restante, G. P. O., Ulan Bator 13, petis nian redakcion aperigi jenan informon: „Mi volas konatiĝi kun tiuj, kiuj vojaĝos pertrajne tra nia lando kaj planas tranokti aú restadi por kelkaj tagoj en Ulan Bator. Bonvenon!

Bv. averti min telefone 515 05. Mi volonte akompanos kiel interpretisto."

Uzu jenan adreson:
KULTURBUND DER DDR
(Kulturligo de GDR)
Organiza Komitato de IFER
Käthe-Kollwitz-Straße 115
DDR — Leizpig
7010

JEPRE 1986

La Junulara Komisiono (Karl-Marx-Stadt) invitas al „Junulara Esperantista Pacrenkonto en Ercmontaro" (JEPRE 1986), septembro 25 — 28, Valbaraĵo Pöhl, junulargastejo, apud Plauen. Kotizo: 65 markoj (por eksterlandanoj), 50 markoj (por GDR-anoj) por tranoktado, manĝaĵoj kaj programo. El la programo: Migradoj tra pitoreska regiono, boatado kaj naĝado, fiŝhokado, „Ne-Bomb-Vespero" kun tendarfajro, urbovizito de Plauen. Korespondada adreso: Christian Papenmeier, Obere Hauptstraße 104, Oelsnitz 9156.

Turingia Esperanto-Lernejo Ilmenau (TELI)

Fondiĝis komuna instanco de la distriktaj estraroj de GDREA de Erfurt, Gera kaj Suhl kun la nomo „Turingia Esperanto-Lernejo Ilmenau". La lernejo havas la taskon plialtigi la lingvan nivelon de la partoprenontoj per oferto de semajnfinaj kursoj dum la jaro por la ŝtataj lingvo-ekzamenoj laú la ŝtupoj G (baza ŝtupo), I kaj IIb. Direktoro de TELI elektiĝis d-ro inĝ. Hans Rogazewsi, laboranta en la Teknika Altlernejo Ilmenau. La sekretariino estas s-ino Hübner.

Kongresoj 1987 en Pollando: sendu antaŭaligojn!

1987, dum la jubilea jaro de Esperanto, en Pollando okazos jenaj kongresoj:

1. **72a Universala Kongreso de Esperanto, 24. — 31. 7. 1987, Varsovio**
2. **43a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Krakovo, 17. — 24. 7. 87**
3. **39a Kongreso de Internacia Federacio de hervojistaj Esperantistoj (IFEF), 16. — 22. 5. 1987**
4. **21a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), 17. — 24. 7. 87**
5. **VIa Internacia Medicina Esperantista Konferenco, Krakovo**

Ĉar por ĉiuj kongresoj verŝajne estos pli da intereso ol disponeblaj lokoj, ĉiu interesulo el GDR por unu aŭ pluraj el la kongresoj sendu neformalan aliĝilon al Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60. La aliĝilo enhavu nomon, adreson, naskiĝjaron, profesion kaj la dezirata(j)n kongreso(j)n. Sendu la aliĝilojn ĝis 30a de septembro 1986. Helpon por aliĝoj GDREA nur donas al tiuj provizore aliĝintoj.

Marbach en GDR:

Ripozejo de japana esperantisto

Sur la tomboŝtono legeblas en Esperanto kaj en la germana: „Ĉi tie dormas Eiichi Doi-Tsuchii 1909 — 1933, nia karega amiko, kiu amegis Germanujon ĝis sia morto, sed kies malforta korpo ne permesis al li fari la grandan laboron por la amikiĝo de Germanujo kaj Japanujo kaj plue de Okcidento kaj Oriento. Li ripozu en Dio."

Marbach estas vilaĝo en Saksio en regiono de Karl-Marx-urbo kun proksimume 1 500 loĝantoj. Antaŭ multaj jaroj en Marbach jam loĝis esperantistino, kiu konatiĝis kun Zamenhof en Dresdeno, kiam tie okazis Esperanto-kongreso. Kiam mortis ĉi tiu esperantistino, Marbach denove havis alian anon de Esperanto. Li estis instruisto, kiu korespondis kun multe da samideanoj el diversaj landoj. Ankaŭ kun juna japana esperantisto. La instruisto estis sperta prezenti sian loĝlokon (Marbach) al la juna japano tiel, ke tiu mem havis la deziron viziti Marbach.

Bedaŭrinde terura malsaneco malhelpis la intencon de la juna japano. Li jam mortis tre juna, sed la plej granda deziro — eble la lasta deziro —, kiun li havis, estis, ripozi en la loĝloko de sia germana amiko en Marbach. La gepatroj de la juna japano plenumis la lastan deziron de sia filo kaj ebligis, ke la urno kun la cindro de la mortinta juna japano estis sendita al Germanio.

Sinjoro Schröder, tio estas la nomo de la iama instruisto el Marbach, mem veturis Hamburgon, por akcepti la urnon el la manoj de la kapitano, kiu per ŝipo kunprenis la urnon de Japanio al Germanio.

Nun junaj Esperanto-gelernantoj de Dr.-Theodor-Neubauer-lernejo Marbach jam dum multaj jaroj flegas la tombon, en kiu nun ripozas du esperantistoj, sinjoro Schröder kaj lia japana amiko.

Heinz Heimann

Kolora animacifilmo „NOKTO DE LA GALAKSIA FERVOJO" uzis Esperanton

Dum la tuta somero de 1985, en kelkaj urboj eĉ ĝis la fino de septembro, en la tuta Japanio kun bela sukceso prezentiĝis la 105-minuta mov-bilda filmo „Nokto de la Galaksia Fervojo (Japane: Ginga — tetudô no yoru)" produktita en vere unuarangaj kondiĉoj: entreprenita de „Asahi Sinbun (tagĵurnalo Asahi)", „Asahi National Broadcasting Co., Ltd. (televidstacio Asahi)" kaj Nippon Herald Films Group"; Originalo de MIYAZAWA Kenzi (1896 — 1933); Rakonto kaj figuroj de MASUMURA Hirosi; Scenario de BETUYAKU Minoru; Muziko de HOSONO Haruomi; Reĝisorita de SUGII Gisaburô; Produktita de „Group Tac Co., Ltd." kaj „Herald Ace Inc.".
Jam delonge multaj havis ideon filmigi la famegan romanon, sed neniu povis

realigi tion, ĉar la fantazia rakonto estas fabelo ne por infanoj kaj do estas profunde filozofia. Ĉi-foja sukceso ŝuldas multon al unikaj figurigo per katoj kaj muziko per sonsintezilo. Por havigi al la belegaj bildoj konkretecon, oni devis desegni literojn sur libroj, pordoj ktp. Aliflanke la produktinto deziris ke la filmo estu sennacieca, ĉar la rakonto mem estas tiel verkita. Tiam venis la ideo uzi Esperanton, kiun la verkinto de l'originala rakonto ankaŭ lernis. Kaj post zigzaga procedo decidiĝis ke la tuto de skriboj en la filmo — ekde prezento de la titolo, subtitoloj laŭčapitraj kaj de ĉefaj stabanoj, skriboj sur la nigratabulo, presaĵoj en presejo, pendaĵoj en butikoj ... — estu en la internacia lingvo (tamen kun kelkaj kapricaĵoj de desegnistoj). Eĉ moneroj estas laŭ la monero de „stelo". Kaj ne nur literoj, ankaŭ kantado de kristanisma himno kaj morsado estas en Esperanto.

Tiel la filmo fariĝas duoble ĝuinda de esperantistoj. Jam planite estas eksporti la filmon al la tuta mondo.

La tuta kunlaboro estis organizita de JEI: Esperantigis s-ro KONISI Gaku kun la helpo de s-ino KIKUSIMA Kazuko; Kantadon gvidis s-ino KIKUDIMS kaj helpis s-ro NOBUKUNI Hirosi, f-ino TANAKA Akiko kaj s-ro KAWAMOTO Hiromi; Morsigis s-ro SAITO Ken'iti.

El „Japanio aktivas" n-37/1985

15a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA

Ĝi okazis la 14an de junio en Karl-Marx-Stadt kaj traktis k. a. la elektojn por la estraroj de la grupoj, de la subdistriktaj kaj distriktaj estraroj kaj la Centra Estraro de GDREA. Plue oni precizigis informojn pri planoj kaj iniciatoj lige al la 100-jariĝo de Esperanto. La membroj de CE de GDREA donis sian subskribon sur alvoko de japanaj esperantistoj por totala malpermeso de nukleaj armiloj. Aparte grava punkto estis la rezultoj de la 11a partia kongreso de SUPG kaj ilia signifo por la esperantistoj de GDR.

Kádár al „HUNGARA VIVO"

La revuo „Hungara vivo" estas unu el la plej belaspektaj kaj valoraj revuoj en Esperanto. Krom informaj artikoloj pri la temo anoncita en la titolo, ĝi ĉiam enhavas gravajn kaj valorajn literaturaĵojn, originalajn kaj tradukitajn, primovadajn artikolojn, trafajn librorecenzojn, ktp. Ĝia kunlaborantaro tute ne limiĝas al Hungario; multaj alilandanoj kontribuis sian obolon al la interesa enhavo.

Jam 25 jarojn ĝi daŭre kaj seninterrompe aperadas. Okaze de la datrevena festo, la **ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio, Janos Kádár,** sendis jenan saluton:

„Okaze de la dudekkvinjara datreveno de la fondo de la revuo mi salutas la redakcion kaj la legantojn de Hungara Vivo. La gazeto per sia kvaronjarcenta agado atingis prestiĝan lokon inter la esperantlingvaj eldonaĵoj de la mondo, kaj akiris multajn amikojn por la hungara popolo kaj ĝia kulturo.

La lingvo Esperanto proksimigas la homojn unu al la alia, servas la interkompreniĝon, kaj per tio ĝi kontribuas al la firmigo de la amikeco kaj fido inter la popoloj. En tio entreprenas indan rolon ankaŭ la hungara Esperanto-movado, kiu surbaze de sia internacia aŭtoritato povas fari multon por la konservo de la paco, granda espero de ni ĉiuj.

„Mi deziras al la hungaraj esperantistoj, al la redakcio, al la enlandaj kaj eksterlandaj legantoj de la revuo, ke ili atingu pluajn sukcesojn en la agado por sia nobla celo."

Mencio de BEA antaŭ la bulgara partia kongreso

En la raporto de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio al la 13a kongreso (aprilo 1986) sur p. 129 estas menciita Bulgara Esperanto-Asocio kiel grava organizaĵo.

Pri LEA en eldonaĵoj de Dietz-Verlag

Dietz-Verlag (Dietz-eldonejo) estas la eldonejo de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio, kaj kiel tia sendube unu el la plej prestiĝaj eldonejoj en GDR. Pro tio estas interese noti, ke la laborista Esperanto-movado estas menciita en kelkaj eldonaĵoj de ĉi-tiu eldonejo:

1. Karl Otto verkis sian biografion „Vom Anwaltsstift zum Hochverräter" (de la prokurora lernanto al superperfidulo), Berlin 1961, 210 p. Karl Otto estis redaktoro de la komunisma ĵurnalo „Der Kämpfer" (la batalanto). En sia libro sur la paĝoj 137 — 141 troviĝas ĉapitro „Esperanto kaj socialismo", kie li mencias sian peresperantan korespondadon kun la muntisto Ernst Sielers el Chemnitz. Otto lernis Esperanton en iu burĝa Esperanto-Grupo. En la menciita ĉapitro li skribas, ke la kontaktoj kun la komunisto Ernst Sielers por li estis gravaj kaj kondukis lin al la legado de marksisma literaturo. Tiel tiuj rememoroj de Karl Otto substrekas la konatan fakton, ke la okupiĝo kun marksisma literaturo estis tre disvastigita en la laborista Esperanto-movado de Germanio. Kiu konis Karl Otto kaj Ernst Sielers, tiu skribu al GDREA.
2. Horst Groschopp verkis pri la kulurlaboro en la german laborista movado ĝis 1914 la libron „Zwischen Bierabend und Bildungsverein" (Inter biervespero kaj klerига societo), Dietz-Verlag Berlin 1985, 244 p. Sur paĝo 75 oni trovas ĉapitron „esperantistoj kaj stenografoj", kie per 16 linioj la aŭtoro objektive aludas la disvastiĝon de Esperanto inter laboristoj.
3. La tria titolo nomiĝas „Arbeiterleben um 1900", 2a eldono, Dietz-Verlag Berlin 1985, 190 p. Sur paĝo 118 oni trovas mencion de Germana Laborista Esperanto-Asocio kiel klasorganisaĵon fonditan 1911 kaj aktivinta por la internacia kunligado de la laboristoj kaj por akceli la pacidealon.
4. Rosemarie Schumann verkis la libron „Amsterdam 1932" (Dietz-Verlag, Berlin 1985, 237 p.). La libro estas dediĉita al la „monda kongreso kontraŭ la imperiisma milito", kiu okazis 1932 en Amsterdam. Laboristaj Esperanto-organizaĵoj estas menciitaj sur p. 27, kiel aliĝintoj al tiu kongreso. Sur p. 33 oni legas „Grandaj organizaĵoj, kiel la Internacio de iamaj frontbatalantoj, la Laboristaj Esperanto-organizaĵoj kaj la Internacio de maristoj kaj havenlaboristoj ŝanĝis la datojn de siaj kongresoj planitaj por la somero 1932 por ilin organizi en Amsterdam, en la kadro de la monda kongreso kontraŭ la imperiisma milito".

Informoj pri la mencio de la laborista Esperanto-movado en prihistoriaj verkoj de GDR esas bonvenaj. Informu GDREA!

— e

Kunfondinto de IPE pri GDR

Iama partopreninto de IPE*) Berlin 1932 Bill Keable, London, feriis dum junio 1985 en la ripozejo „Theodor Neubauer" Tabarz. Post amika renkonto kun grupanoj el Eisenach li skribis por la kroniko jenajn vortojn:

„Tiu ĉi veterana angla komunisto kaj esperantisto, samkiel ĉiuj britaj komunistoj, kiuj vizitis GDR, estas rekuraĝigitaj de ĉio, kion ni vidas kaj aŭdas. En GDR vi memevidente konstruas aŭtentikan socialisman socion, por kiu ni mem ankoraŭ sonĝas kaj batalas — lando de paco, feliĉo kaj bona perspektivo evidenta por ĉiuj kun okuloj por vidi — dum nia propra patrolando estas lando de konstanta ĝenado kaj senperspektiveco por la laborista klaso, kaj precipe por la junularo.

Daŭrigu, ni petas, tiel ke via respublika sukceso estas sukceso por nia komuna afero — NI HAVAS INVESTON EN VI! — kaj via plua progreso ankoraŭ, kiel ĝis nun, provizos tre necesan inspiron por komunistoj ankoraŭ batalantoj en kapitalismaj landoj!

Al kamaradoj Ruth kaj Richard **) mi dankas por ilia agrabla kaj instrua gastigemo kaj esperas, ke mi denove havos okazon renkontiĝi kun ili.

Por Paco kaj Socialismo!
Bill Keable"

*) Internacio de Proleta Esperantistaro, fondita 1932 en Berlin
**) temas pri Ruth kaj Richard Partecke el Eisenach

Honore al Ernst Thälmann

La 14an de aprilo 1986 ĉirkaŭ 40 esperantistoj el Berlin vizitis la memorejon pri Ernst Thälmann en la Liebknecht-Haus (la Liebknecht-domo), iama sidejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Germanio. La estro de la memorejo gvidis tra institucio, kiu estis renovigita kaj novaranĝita okaze de la 100a naskiĝtago de Ernst Thälmann (16. 4. 1986).

Sekvis tre interesa intervjuo kun la veteranoj de la iama revolucia Germana Laborista Esperanto-Asocio Alice kaj Ludwig Schödl, kiun gvidis Fritz Wollenberg, la aranĝinto de la tuta kunveno.

La konataj esperantistoj prezentis rememorojn pri la malfacila politika laboro dum la 20aj kaj 30aj jaroj kaj akcentis la agadon de la laboristaj esperantistoj. La tuta aranĝo ja ankaŭ okazis omaĝe al la 75a datreveno de la fondiĝo de GLEA.

Ni funebras

— pro la forpaso de Rudolf Jacobi, 79jara, la 2an de aprilo 1986 en Bernau. Li fondis la Esperanto-grupon en Bernau.
— pro la forpaso de la iama laborista esperantisto Alfred Kraushaar, 84jara, la 9an de marto 1986 en Berlin. Li estis vicprezidinto de GLEA.

Ni kore gratulas

— al d-ro Till Dahlenburg, membro de la Centra Estraro de GDREA, kiu la 12an de junio 1986 estis nomumita **studkonsilisto.**

Propra klubejo en Leipzig

Ekde julio ĉi-jara [1986] la leipzigaj geesperantistoj disponas pri propra klubejo, kiu konsistas el entute tri diversgrandaj ĉambroj (du el ili eĉ estas ĉambregoj). Helpe de s-ino Ellen Rohde, ne-esperantistino (tamen ege interesiĝanta pri la Esperanto-movedo), urba konsilistino por kulturo de la okcidenta administra teritorio de la foira metropolo, la leipziganoj fariĝis „klubejaj posedantoj". Kvar tagojn de ĉiu semajno la esperantistoj povas eluzi la ĉambraron en la Georg-Schwarz-Straße 56 (Leipzig-Leutzsch). La bildigita insigno estas la nova kluba signo. La leono, blazona, besto de Leipzig, okulumas per esperanta stelo!

Konkurso kun novaj kondiĉoj

La redakcio de „der esperantist" ekde jaroj okazigas tradukkonkurson, tiel ankaŭ en 1986. Nun, tamen, oni ŝanĝis la kondiĉojn jene:
1-e: Traduku laŭ via elekto rakonton aŭ fragmenton de romano, novelo aŭ rakonto de GDR-aŭtoro (amplekso 2 ĝis 8 paĝoj).
2-e: La tradukoj estu tajpitaj sur A4-a paperformato kun tri kopioj.
3-e: Indiku kiom eble plej precize la fonton (titolo, aŭtoro, eldonejo, jaro de la eldono ktp.).
4-e: Sendu ĉion ĉi al Dieter Berndt, DDR— 1020 Berlin, Berolinastr. 2 ĝis la 30-a de septembro 1986.
5-e: Partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj, sed ne membroj de la Centra Estraro de GDREA kaj jurianoj.
6-e: Vi povas partopreni ankaŭ per pluraj tradukaĵoj. La redakcio rajtas publikigi viajn tradukojn.
7-e: La konkurso estas anonima, tial subskribu viajn tradukaĵojn per kaŝnomo. Aldonu fermitan koverton en kiu troviĝu viaj veraj nomo kaj adreso — sur la koverton skribu la kaŝnomon.

Esperanto en periodaĵo de la Blindula Asocio de GDR

S-ino Ursula Heiden el Rostock (2500 Rostock 1, Lange Straße 21/34) estas membro de la Blindula Asocio de GDR kaj tre aktiva esperantistino. Dank al ŝia aktivado aperis diversaj materialoj en periodaĵoj de la organizajo. Jen kelkaj.
En la junulara revuo de la asocio „Freundschaft" (Amikeco) 10/83 aperis noto pri ŝia restado 1983 en Hungario.
Aperis kontribuo pri Zamenhof, okaze de lia 125a naskiĝtago, en n-ro 12/84 de la akustika revuo „Kultur und Freizeit" (Kulturo kaj libera tempo).
En la revuo „Gegenwart" (Nuntempo) 5/85 kaj en la akustika revuo „Kultur und Freizeit" 5/85 aperis kontribuoj pri la kontaktoj, kiujn havis Ursula Heiden kun la membro de la Aleksandrow-ensemblo, Viktor Nikitin.
Fine de 1983 aperis kontribuo pri Esperanto en la porvirina blindula gazeto „Die Freundin" (La amikino).
Ursula Heiden multfoje varbis por Esperanto kaj disponigas al lernemuloj kasedojn. Ŝi estas tre ligita al Esperanto kaj multe helpas al interesitoj.
Ni do esperu, ke Esperanto reludos certan rolon en la rondoj de la Blindula Asocio en GDR.
Eble ne estas tro konata, ke 1972 la menciita Asocio ja subskribis kontrakton pri kunlaboro kun la iama Centra Laborrondo Esperanto. Eĉ aperis brajle produktita revuo „Amikeco" en Esperanto. Pro nekonataj kaŭzoj la blinda esperantisto (Günter Heil), kiu siatempe respondecis pri la revuo kaj eĉ estis membro de Centra Laborrondo, forlasis la esperantistojn kaj ne plu respondis al inform-petaj leteroj de CLE. Tial la grava aktiveco, bedaŭrinde portita nur de unu persono, ĉesis.
Estus bone, se ankaŭ aliaj blindaj esperantistoj agus tiel bone kiel Ursula Heiden el Rostock. Tiam oni eventuale povus revivigi la — almenaŭ formale — ankoraŭ validan kontrakton pri kunlaboro inter la Blindula Asocio kaj la esperantistoj.

D. B.

Perkomputila membroadministrado

Kadre de fakgrupo „Komputilistoj" de Centra Estraro de GDREA estas verkita mikrokomputila programo por la administrado de membroj kaj partoprenantoj en kluboj, kursoj, renkontiĝoj ktp. Ĝi estas skribita en BASIC kaj funkcias je la operacia sistemo MicroDOS (kaj ekvivalentaj kiel SCP, CP/M). Tiuj operaciaj sistemoj estas uzataj ekzemple de la ROBOTRON-komputiloj A 5120, A 5130 kaj PC 1715.
La fontoprogramo konsistas el 730 linioj kaj estas pli ol 19200 bajtojn longa. Ĝi plenumas la jenajn askojn:
— registrado de membroj
— presado de ĉiuj datumoj
— presado de ĉiuj adresoj
— presado de elekteblaj adresoj
— presado de statistiko je aĝo, sekso, membreco kaj gvida funkcio en asocio ktp.

Por ĉiu persono estas storataj nomo, adreso, naskiĝjaro, distrikto, fako, sekso, mebreco kaj gvida funkcio en la asocio, lernado de E-to (kie), partopreno en seminarioj kaj konferencoj kaj du libere uzeblaj parametroj. Ĉiuj datumoj estas ŝanĝeblaj. Minidisko (5,25 coloj) povas stori ĝis ĉ. 1000 personoj, en 8-cola disko pli ol 2000.
La programo estos distribuata al la distriktaj estraroj. Interesuloj kontaktu la aŭtoron: 1720 — Ludwigsfelde, PF 42.

Michael Lennartz

Tendaro por Esperanto-pioniroj

De la 23-a ĝis 28-a de februaro 1986 okazis renkontiĝo de esperantistaj junaj pioniroj en la Centra Pionira Tendaro „Palmiro Togliatti" en Einsiedel ĉe Karl-Marx-Stadt. La aranĝon organizis la disktrikta junulara komisiono de GDREA en Karl-Marx-Stadt kun afabla subteno de la disktrikta estraro de Kulturligo kaj de la sekcio por junaj pioniroj kaj lerneja junularo ĉe la distrikta estraro de la Libera Germana Junularo. Partoprenis 14 lernejanoj el diversaj distriktoj de GDR, 12 pioniroj el Koszalin, Pollando, kaj 14 knabinoj el Trutnov/ĈSSR.
La programo inkluzivis i. a. ekskursojn al Aue kaj Karl-Marx-Stadt, dumnoktan migradon, karnevalan vesperon kaj renkontiĝon kun la magiisto Thomas Amlung el Karl-Marx-Stadt. Ĉiutage estis duhora Esperanto-kurso, okazis kantetoj kaj diversaj ludoj.

(laŭ Christian Papenmeier)

Honora membro

Hanna Scheffs, kiu dum multaj jaroj sukcese gvidis la Distriktan Estraron de GDREA de Potsdam, elektiĝis Honora Membro de la Distrikta Estraro de Kulturligo Potsdam.

Distrikta renkontiĝo en Waltershausen

La 10an de majo 1986 pli ol 40 geesperantistoj en Waltershausen okazigis sian distriktan renkontiĝon (distrikto Erfurt) kiel parton de la tagoj de Kulturligo. Oni diskutis pri 100 jaroj Esperanto, prezentis la sovetian esperantlingvan filmon „Litovaj akvoj" kaj faris interesan ekskurson tra la urbo. Partoprenis la sekretario de GDREA.

ABONU, ABONIGU LA ESPERANTO-GAZETON „PACO"!

Aperas en 8—10 kajeroj jare. Specimeno senpage sendata tuj.
Utiligu la okazon! Por la jaro de paco la redakcio DONACOS AL ĈIU NOVA ABONANTO po tri jam aperintajn numerojn de la gazeto. Abonu tuj ĉe la landaj perantoj aŭ ĉe adreso de „PACO" — SOFIA 1000, PK 66, Bulgario.
Abonebla en GDR
Abono por duonjaro kostas 18,50 M. Ĝi estas abonebla ĉe Zentralvertrieb des PZV, 7900 Falkenberg, Ubigauer Str. 4.

XIV-a Printempa Porpaca Marŝo en Jablonec

Ankaŭ 1986 estis la tradicia porpaca marŝo tra la ĉarma pejzaĝo de Isermontaro, organizita de Esperanto-klubo en Jablonec la 26-an de marto 1986. La distancoj estis elektitaj (15/25/35 km). Partoprenis i. a. grupoj kaj unuopuloj el Sovetunio, ČSSR kaj GDR — ankaŭ neesperantistoj (lernantoj kaj diversaj grupoj). Ĉiuj partoprenintoj ricevis dokumenton kaj plakedon (kun la signo de la mondpaca jaro), eksterlandanoj ankaŭ la unikajon de medalo (kun la signo de jaro de mondpaco kaj „paco" diverslingve i. e. en Esperanto). La klubmembroj prezentis lumbildprelegon pri Prago, kaj Siegfried Koch ankaŭ prelegis (per lumbildoj) pri Prago, Lanĉov, Bernau kaj pri la tradicia Zamenhoffesto. **Lutz Seupel**

Letervespero en Halle

La Esperanto-grupo en Halle ĉe la rivero Saale aranĝos la 2-an letervesperon. Bonvolu skribi amase mallongajn leterojn ĝis la 1-a de septembro 1986, la internacia tago de la paco, kaj sendu kolorajn bildkartojn de via hejmlando! Nia intenco estas ekspozicio okaze de la centjara jubileo de Esperanto en la jaro 1987. Per tiu ekspozicio ni volas demonstri taŭgecon de Esperanto kiel internacia lingvo por popolinterkomprenado kaj strebado por paco. Ĉiu sendajo estos respondata.

Junularo pri kulturo en Halle

La 2-aj labortagoj de Kulturo de Esperantojunularo de GDR okazis en Halle de la 28-a de februaro ĝis la 2-a de marto 1986. La celoj de aranĝo estis jenaj:
— evoluigi kulturajn valorojn kaj konceptojn por lerni aŭ plialtigi la lingvan kvaliton de la junaj partoprenantoj,
— riĉigi la personecan evoluadon de la junuloj.

Formiĝis la laborgrupoj I plastika arto, II figura arto, III muziko, IV literaturo.
La FDJ kaj la konsilio de urba distrikto subtenis la aranĝon. Vendredon vespere prezentis sin la polaj gastoj. Sabate la junuloj klopodis pri kreiva kaj disciplinita laboro en la respektivaj laborgrupoj, helpe de la s-aninoj Renate Levin kaj Helga Plötner. Vespere la membroj de laborgrupoj prezentis la rezultojn de tuttaga kreado — 1½horan grandsukcesan kulturprogramon — honorigita per multe da laŭdo kaj aplaŭdo.
Dimanĉon antaŭtagmeze ĉiuj renkontiĝis en la muzeo „Händelhaus" por partopreni gvidadon, tradukita en Esperanton. **Olaf Kunze**

10-a norddistrikta renkontiĝo

Ĝi okazis la 26an de aprilo 1986 en Schwerin. Partoprenis 50 esperantistoj el la distriktoj Rostock, Schwerin kaj Neubrandenburg.

Ŝtofemblemo

Ĉe Rudolf Eichler (9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Str. 21) estas ricevebla ŝtofemblemo kun la teksto „Esperanto-Turisma Sekcio" kaj kun la stelo, verda kaj blua koloroj, 16 x 5 cm. Peco kostas 1,50 m.

En 1987 en Sofio okazos EKSPOZICIO DE KOLEKTAJOJ

honore al 100-jara jubileo de Esperanto en tri sekcioj:
1. D-ro L. L. Zamenhof sur bildkartoj.
2. Bildkartoj kun subskriboj en Esperanto.
3. Kongresaj urboj de Universalaj kongresoj de Esperanto (Prefere en la jaroj de la koncerna kongreso).

Preparas la ekspozicion la konata bulgara kolektanto-esperantisto Georgi Litov, sub la aŭspico de Bulgara Esperpantista Asocio kaj la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj.
Estas petataj la esperantistoj tutmonde kontribui al la ekspozicio per dispono de konvenaj eksponajoj, ĉu donace, ĉu rekompence. Ĉion sendu al adreso:
Georgi Litov, Hipodruma 34-A, 1612 SOFIO, BULGARIO.

Alvoko al esperantistaj presistoj!

Jam multaj presistoj laboras por kaj per Esperanto. Ni taksas la tempon matura kunigi la samfakulojn de tiu tereno. Ni intencas unue konigi al la esperantistaj presistoj nomaron (adreson) de tiuj presistoj, kiuj sentas la bezonon de kunlaboro.
Mi petas tiujn presistojn, kiuj estonte intencas kunlabori, bonvolu konigi la precizan adreson.
Se vi havas opinion pri la planita kunlaboro, bonvolu skribi tion al s-ro Vilmos Bacsa,
5601 Gyula, pk. 96, Hungario.

ALVOKO AL LA PACISTOJ TRA LA MONDO

Kruĉige de la limoj ŝtata (franc-belga) kaj lingva (inter la franca kaj la flandra lingvujoj), ne malproksime de Nederlando kaj de Britio, la loka Pacmovado strebas konstitui, en urbo oTurcoing (Turkŭa), pacisman dokumentejon serve al ĉiuj pacamantoj en la regiono, trans la ĉiuspecaj limoj.
Pro tio, ni kolektas ĉiujn ajn dokumentojn pri la pac- kaj malarmad-aferoj (ne nur en Esperanto).
Jam elkoran dankegon al ĉiuj geamikoj, kiuj respondos nian alvokon. Por la Packomitato: Christian Derinck, 42, rue de Bondues, F—59200 Tourcoing (Francio)

IFER en etero

Je la 6-a de aprilo 1986 la Esperanto-Redakcio de „Radio Polonia" disradiis elsendaĵon 20-minutan pri IFER '86.

NOVA LIBRO aperos ĉe GEOLOGIA INSTITUTO DE AKADEMIO DE SCIENCOJ DE TAĜIKA SSR, GEOLOGIA SEKCIO DE INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA: GEOLOGIO INTERNACIA, Vol. 6 (Scienca artikolaro en la lingvo Esperanto) Respondecaj redaktoroj: akademiano de Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR, R. B. BARATOV, (Sovetunio) kaj RNDr. Josef KAVKA, CSc. (Ĉeĥoslovakio), DUŠANBE, „DONIŠ" 1986

Ĉiuj sciencistoj, kiuj okupiĝis pri tersciencoj, bone konas la mondfaman serion de esperantlingva scienca artikolaro „Geologio Internacia", kiun partoprenis multaj famekonataj scienculoj el diversaj landoj, kaj kiu akiris vastan popularecon ĉe geologia esperantistaro. Kvin antaŭaj volumoj estis laŭvice eldonitaj en Ĉeĥoslovakio (1968, 1972), Pollando (1976, 1982), Hungario (1984), kaj nun la sekva 6-a volumo de la artikolaro estas planata por eldono en Sovetunio fare de Akademio de Sciencoj de Taĝiko. Respondecaj redaktoroj de ĉi volumo estas akademiano de Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR R. B. Baratov (Geologia Instituto, Dušanbe) kaj la konstanta redaktoro de antaŭaj volumoj RNDr. Josef Kavka, CSc. (GEOINDUSTRIA, Praha). Certan lokon en la volumo okupas la artikoloj karakterizantaj la diversajn trajtojn de geologia konstituo de Taĝiko, inter kiuj elstaras la brila populariga verko de akademio R. B. Baratov, kiu traktas la teritorion de Taĝiko kiel naturan geologian laboratorion. Krom pluraj aŭtoroj priskribantaj geologajn specifecojn de apartaj regionoj de Sovetunio, la legonto trovos en la volumo la verkojn karakterizantajn geologiajn demandojn en diversaj regionoj de Centra Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kies aŭtoroj estas prezentitaj de famaj nomoj kiel d-roj J. Kavka (Ĉeĥoslovakio), E. Dudich (Hungario), Jannes Markus Mabesoone (Brazilio), Sylwester Skompski (Pollando), k. a. Ĉi tiu artikolaro celas ne nur informi la samfakulojn pri la plej modernaj donitaĵoj en la teresploraj sciencoj, sed ankaŭ popularigi inter tersciencistoj la lingvon Esperanto kiel la plej taŭgan rimedon por internacia komunikado en la scienca medio. Ĉiuj artikoloj de la volumo estas akompanataj de la koncizaj resumoj en la lingvo de tiu lando, kiun prezentas la aŭtoro.

Ĉar la eldono de tiaspeca libro en Sovetunio estas tute nova kaj nekutima afero, la eldonkvanto de la libro kaj ĝia apero plene dependos de la nombro de mendoj por tiu ĉi libro. Ĉiuj priinteresataj scienc-esploraj organizaĵoj kaj ĉiuj Esperanto-asocioj en diversaj landoj estas petataj mendi maksimume laŭeblan kvanton de tiu ĉi libro en la adreso: VO „Mejdunarodnaja kniga", ul. Dimitrova, 39/20, Moskvo, SU 113095, USSR.

Muzeo de paco en Samarkand

Samarkanda klubo de internacia amikeco „Esperanto" daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, (infan)-desegnaĵojn, insignojn, gluafiŝetojn, leterojn pri paco, fotojn, revuojn kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por la jam tradiciaj inernaciaj porpacaj ekspozicioj kaj fondota Muzeo de Paco. Tiuteme oni korespondas en Esperanto, en la rusa, la angla kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj.

Bonvolu ekspedi ĉion al: International Friendship Club „Esperanto, P. O. Box 76, SU—703000 **SAMARKAND,** Usbekistan, USSR

Vidaĵkartoj pri paco

Esperanto-klubo Vítkovice, kunlabore kun Pavel Rak, konata karikaturisto kaj esperantisto, eldonis pluajn vidajkartojn honore al INTERNACIA JARO DE PACO 1986.

Ni proponas al vi ekzemplerojn, post ricevo de via ekvivalento (respondkuponoj, esperantistaj poŝt- kaj vidaĵkartoj, glumarkoj, presaĵoj, koloraj diapozitivoj kaj insignoj).

Ni dekalkulos poŝtelspezojn. Preparita estas eldono de kontraŭmilitaj leterpaperoj.

Adreso: ESPERANTO-KLUBO VITKOVICE, P. K. ĉ. 55, 70300 Ostrava 3, Ĉeĥoslovakio

Al vizitantoj de Vilnius!

Se vi intencas vojaĝi al litova ĉefurbo Vilnius, nepre kontaktiĝu kun junulara E-klubo „Juneco". Junecanoj ĉiam volonte gvidos vin tra la urbo, konatigos kun litova E-movado. Kontaktu pertelefone al prezidanto Sigitas Žilionis (ofica 73 30 75), vicprezidantino Dalia Bičiunaite (ofica 75 40 09, hejma 42 10 65) aŭ sufiĉe antaŭe skribu al E-klubo „Juneco", P. O. Box 61, 232000 Vilnius-C, Litovio.

Bonvenon en litova ĉefurbo! „JUNECO"

Hungara Junulara Renkontiĝo

La ĉijara renkontiĝo de la Hungara Esperanto-Junularo okazis de 4a ĝis 6a de aprilo. Partoprenis ĝin flanke de la Junulara Sekcio de GDREA Andreas Penk.

La libro pri Trifon Ĥristovski en franca traduko

La belga MEM-sekcio antaŭ nelonge eldonis la faman libron „Mia vivo" de la bulgara revoluciulo kaj esperantisto Trifon Ĥristovski en la franca traduko. En la jaro 1982 aperis esperantlingva traduko de la bulgara originalo. La traduko estis de Nikola Aleksiev. La francan tradukon, pere de la esperantista versio, pretigis René Deprez, Albert Heuschen kaj Clément Tholet. Clément Tholet estas ĝenerala sekretario de MEM.

Werner Bormann: La evoluo de Esperanto kaj la Akademio. Publikaĵoj de Germana Esperanto-Instituto (FRG), 7. Meßkirch: BAVELO. 1985. 14 p.

La aŭtoro, ĝenerala sekretario de la Akademio de Esperanto, levas kelkajn interesajn lingvajn demandojn de Esperanto. I. a. li diskutas la problemon, ču oficialigi novajn vortojn pere de la Akademio, ĉu strike normigi ĉion aŭ lasi iom da libera elasteco. Li traktas la problemon de la facileco, kiu donu la kadron de la evoluo de Esperanto kaj avertas kontraŭ tro da neologismemo. Malgraŭ la titolo la interesa eseo ne tiom traktas la faktan rolon de la Akademio mem (neniu bone scias, kion ĝi vere faras) sed pli la personajn kaj pragmatike tute bone motivitajn opiniojn de la aŭtoro. Tute bona diskutveka eseo. **D. B.**

Interlingvistika kuriozaĵo

Sekvas fragmento el la satira-utopia eseo „Tiel rotacias la rado de la tempo aŭ Crostwitz post cent jaroj", kiun verŝajne verkis la subpastro soraba Miktawŝ Andricki el Ralbitz. La satiraĵo aperis 1897 en la soraba revuo „Krajan" (≈ samlandano aŭ samregionano). Estas interse konstati, ke la teksto estas publikigita 10 jarojn post la apero de Esperanto kaj dum tempo, kiam Volapuko jam forte estis regresinta. Jen la teksto:

„La soraboj ne nur similiĝos al la aliaj popoloj kaj nacioj laŭ la kostumo kaj aliaj ajoj jam menciitaj, sed ankaŭ laŭ la lingvo. Kio? La soraba lingvo ne plu ekzistos? Kaj niaj posteuloj fariĝu germanoj? Tiel estos: la soraba lingvo estos forgesita. Sed prc kio ni en tiu ĉi kazo konstruas la Soraban Domon? Mia konsilo: ni ĝin konstruu kiel eble plej rapide! Kio poste okazos al ĝi, montriĝos. Almenaŭ niaj posteuloj vidos, ke iam ekzistis soraboj. Ĉu ni tiam estos germanigitaj? Tute ne! Formortintaj? Ankaŭ ne. „Volapuko" regos en la uta mondo! Nek la germana, nek la franca, nek la angla, nek la rusa lingvo venkos, venkos Volapuko!

Kio estas tio?, eble pensos nia samregionano. Tio estas tute nova lingvo, ne evoluinta de si mem, sed elpensita de klera pastro kaj ellernebla dum kelkaj tagoj. En tiu ĉi lingvo patro nomiĝas papa, patrino — mama, manĝi — mam, hundo — wau, kato — miau ktp. Multaj francoj, kaj laŭdire ankaŭ ĉinoj, japanoj, hotentotoj en zulua Afriko. Kaj post malmultaj tagoj ĉiuj povos interkompreniĝi per ĉi tiu lingvo. Tio ja estas tre praktika afero. Jam hodiaŭ en urbo kiel Dresdeno Komercisto, Konfesprenanto, advokado devus regi ok ĝis dek diferencajn lingvojn, se li volus interkompreniĝi kun ĉiu. Tiom estas postulataj. Sed se oni konstruos ĉiam novajn fervojojn, kaj la homoj havos la eblon ĉiam pli vagadi, estos ankoraŭ multe pli malbone. Tial la estonteco apartenas al Volapuko, ankaŭ en Crostwitz. Do mi konsilus al sorabaj instruistoj, inspektoroj, klerikoj kaj lernejestroj, kiuj estas por la progreso, komenci la instruadon en la soraba lernejo ne per germana aboco-libro, ne per germana horalo, sed per Volapuko."

Trad. D-ro Ronald Lötzsch

Alvoko por AIMAV-kolokvo 1987

En aprilo-majo 1987, AIMAV (Internacia Asocio por la Esploro kaj Disvastigo de Aŭdovidaj kaj Struktur-sumaj metodoj) organizos ĉe la Universitato en Gento (Belgio) plurtagan internacian kolokvon nacilingvan pri la problemaro rilate al la disvastigo kaj la pedagogio de tiel nomataj „internaciaj lingvoj". La titolo proponita estas: La valoro de universala ‚lingua franca', natura aŭ planita. Ĝi estos pritraktata el kvar vidpunktoj: komunika, psikologia, pedagogia kaj sociokultura.

La fincelo estas interesigi neesperantistajn esploristojn, instruistojn kaj profesorojn, oficialajn lingvo-respondeculojn de internaciaj organizaĵoj pri Esperanto. Tamen, por altiri tiujn homojn, estas necese plilarĝigi la temaron, kaj ne limigi ĝin al Esperanto.

Estos okazo funde analizi la lingvan situacion en la Eŭropa Komunumo, la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, pritrakti la specifan staton de la angla lingvo en la mondo, kritikeme konsideri ĉiujn jam proponitajn solvojn kaj rimedojn kaj precipe prezenti altnivele Esperanton en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

La uzotaj lingvoj estos la franca, la nederlanda, la angla kaj Esperanto. Ĉiuj referaĵoj aperos poste en libro, eldonota de AIMAV en unu el ĝiaj sciencaj serioj.

Ĉi tiu alvoko nuligas tiun, kiun mi sendis antaŭ ok monatoj al kelkaj unuopaj esperantistoj pri la sama kolokvo. La temo tiam proponita: Esperanto en la lernejo: bilanco kaj perspektivoj, estos pritraktata de ILEI ĝis 1987. Mi rekontaktos tiujn kiuj favore respondis.

Ni nun serĉas kunlaborantojn, kiuj konsentas fari kelkajn esplor- aŭ kompillaborojn aŭ prezenti referaĵojn. La oficiala AIMAV-cirkulero aperis en februaro-marto 1986 kaj estlas tre larĝe disvastigata.

Kontaktadreso por la esperantistoj:
Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A,
B — 2180 Kalmthout

Lingvistoj 1987 en Berlin (GDR)

La XIVa Internacia Kongreso de Lingvistoj okazos 1987, de la 10a ĝis 15a de aŭgusto en Berlin, ĉefurbo de GDR.

Jen unika ŝanco, en la jubilea jaro de Esperanto, kadre de kongreso atentigi pri la fenomeno de 100 jarojn funkcianta planlingvo.

La ĝenerala temo de la kongreso estas „Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco laŭ disciplinaj kaj interdisciplinaj tranktomanieroj kaj rezultoj".

La kongreso laboros en 6 plenkunsidoj, 19 sekcioj kaj krome havos ĉetablajn diskutojn.

Por interlingvistoj, esperantologoj aparte bonvenaj verŝajne estos la sekcioj: 9. „Lingvoplanado kaj lingvopolitiko", 10. „Lingvaj kontaktoj", 11. „Alproprigo de lingvoj", 15. „Komputa lingvistiko", 16. „Universalaĵoj kaj tipologio", 19. „Historio de lingvoscienco".

Se vi interesiĝas pri la kongreso kaj deziras pli da informoj, petu esperantlingvan informilon ĉe: D-ro Detlev Blanke, DDR—1141 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05.

14-a SIS

La 14an Sciencan Interlingvistikan Simpozion, de 27a de aprilo ĝis 1-a de majo 1986 en Varsovio partoprenis flanke de GDREA Ulrich Becker, membro de la Junulara Sekcio de GDREA.

Ni kore gratulas al

— Margot Seeger, Riesa, prezidantino de la lubdistrikta estraro de GDREA, kiu fariĝis 60jara la 7an de junio 1986
— Gerda Wald el Coswig okaze de ŝia 65a naskiĝtago, la 4an de decembro 1986
— Margarete Augustat el Meißen, okaze de ŝia 70a naskiĝtago la 13an de decembro 1986
— Reinhold Gallien el Riesa, iama membro de LEA, kiu fariĝis 80jara la 6an de januaro 1986
— Georg Liebscher el Riesa, iama membro de LEA, kiu festos sian 85an naskiĝtagon la 8an de oktobro 1986

30 000 Esperanto-elsendoj el Varsovio!

Antaŭ nelonge la Esperanto-elsendoj de Radio Polonia solenis sian 25jariĝon (en 1984) kaj samjare oni aŭdigis la 25milan E-elsendon. Sed la tempo pasas rapide kaj jen evidentiĝas, ke ĉijare Radio Polonia aŭdigis la 30milan disaŭdigon en la Internacia Lingvo. Tiu jubilea disaŭdigo pasis la 26an de julio 1986, kaj do ĝi kongruas kun la datreveno de la apero de la Unua Libro de d-ro Zamenhof kaj enpaŝo en la Jubilean Jaron. Hazardo, sed ja agrabla! La 30mila disaŭdigo estis tiu je la 19,30 laŭ la universala tempo kaj ĝi havis duoble solenan karakteron pro la Jubilea Jaro. Jam nun oni planas prezenti ĝin kelkfoje je aliaj horoj kaj ondolongoj.

100-mila letero al la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia

En la pasinta 1985 jaro la E-Redakcio de Radio Polonia ricevis 11 032 korespondajojn kaj unuafoje en la historio de la elsendoj ĝi okupis la unuan lokon inter la redakcioj de la tuta eksterlanda fako de Pola Radio kaj Televido. Plej multe da korespondajoj venis el Federacia Respubliko Germanujo, Finnlando, Sovetunio, Ĉehoslovakio, GDR, Nederlando kaj Britio. Ĝis la fino de decembro 1985 la E-Redakcio ricevis entute 95 450 korespnodajojn en sia tuta historio (de 4. 4. 1959). Ĉar la nombro de la aŭskultantoj konstante kreskas, la 100-mila korespondajo venis en majo 1986. Ni rememorigu, ke la unuan leteron, kiu venis, skribis Michael Dartige el Francujo en 1959.

Esperanto-Redakcio, Radio Polonia
Box 46, 00-950 Varsovio, Pollando

EMOCIIĜEMA „GERMAN PIRLOT"

En „der esperantist" n-ro 135 [1/1986], p-9 troviĝas ekstrakto el letero de „Germain Pirlot". Ĉar li abomenas mian Esperantigon de propraj nomoj, li emocie reagas, kredante sin rajtigita ofendi min. Mian procedon de Esperantigo li nomas FANATIKA, ne indikante, en kio konsistas la fanatikeco. Mian pseŭdonimon li jen ignoras, jen diras, ke, nomante min Ŝulco, mi „eble hontas" pro mia Germanceo. Mian tradukon de LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM' li nomas stulta, ne indikante, el kio konsistas la stulteco. Kaj, tre strange, li diras, ke, laŭ li, estas ege bedaŭrinde, ke pro la neniigo de la Germana etoso, Esperanto NE rolas kiel kulturneniigilo. Tion komprenu, kiu kapablas! La Esperantigon de propraj nomoj ne inventis mi. „Germain Pirlot" evidente ne scias, kion Zamenhofo skribis pri ĝi (O. V. p. 80-81; L. R. n-ro 61). Kaj li ignoras, kion opinias prof. Szerdahelyi: „Pri la eble diskutebla, sed tamen tolerebla transskribo de propraj nomoj, ankoraŭ ne ĝenerale akceptata en la lingvo-uzado, ni tuj notu, ke sian propran principon la tradukinto absolute konsekvence sekvas de la komenco ĝis la fino." Konsekvence, jes. Fanatike, ne.

„Germain Pirlot" bonvolu klarigi, kial nomformoj kiel ekzemple Aheno, Frankfurto, Germana Demokratia Respubliko, Kolonjo, Lemgo, Munkeno, Rejno, Solnhofeno aŭ Bertoldo, Edelgardino, Eginhardo, Elzino, Frederiko, Gertrudino, Henriko, Herberto, Konrado, Kurto, Valtero, Vernero, Vilhelmo ne sentigas Germanan etoson. Preskaŭ ĉiuj estas registritaj en PIV. Kaj li bonvolu diri al mi, kion mi faru pri la nomoj de ne-Germana origino, kiel ekzemple „Andalusier, Buenos Aires, Beduine, Brasilien, Honan, Huelva, Kreml, Le Boche, Napoleon, Persepolis, Puelco, Saudi, Stalin, Schweden, Chagall, Vereinigte Staaten von Amerika, Worcester"? Ĉu mi, por konservi la Germanecon de la romano, lasu ilin en la ĉi tie citita formo, kiun ili havas en la Boela teksto?

Tiu Germaneco ne estas forigebla nek per tradukoj en ne-Hindeŭropain lingvojn, eĉ ne per uzo de ne-Latinaj alfabetoj. La verkista talento de Henriko Boelo estas tre forta. Ĉiu paĝo, preskaŭ ĉiu frazo spiras la etoson de la Federacia Respubliko Germanujo de la sepdekaj jaroj. Tion ja faras ne nur la pli aŭ malpli hazardaj nomoj.

Rikardo Ŝulco

Rimarko de la redakcio

Nur por doni eblecon respondi al s-ro Ŝulco ni presas lian leteron. Ni ne tro emas engaĝiĝi en la diskuton pri la propraj nomoj. Sed ŝajnas, ke la letero de s-ro Ŝulco plene pravigas la opinion de s-ro Pirlot.

Doktoriga disertacio de József Páva

La disertacio havas la titolon: „La semantika kampo de la verbo TENI kompare kun ĝiaj hungara kaj franca ekvivalentoj". La verko József Páva (Esperanto-fakrondo de Tokodaltáró, Hungario) estas 226-paĝa. La jurio estis fakestro Prof. D-ro ZSILKA kaj docento D-ro I. SZERDAHELYI. La buŝaj ekzamenoj estis hungarlingvaj pri interlingvistiko, historio de pedagogio kaj historio de filozofio.
La titolon Dr. Univ. de Universitato de Budapest (ELTE) József PÁVA ricevis la 22-an de junio 1985.

Károly Weisz

Kurso

GDREA Potsdam organizas intensivan lingvokurson, kiu okazos de la 27-a oktobro ĝis la 1-a de novembro 1986 en Bollmannsruh, subdistrikto Brandenburg. Interesiĝantoj tuj turnu sin al: Distrikta Estraro de GDREA, Mangerstraße 34/36, Potsdam, DDR-1500.

Recenzoj

SALUTINDA DEMARŜO DE KANADA MEMBRO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

„Akademiaj Studoj" kajeroj I (por 1983) kaj II (por 1984), daŭrigotaj ĉiujare. Kolekto de lingvaj studoj pri aktualaj temoj kaj/aŭ problemoj en la lingvo Esperanto.
Eldonitaj de Rüdiger Eichholz, estro de Sekcio Teknikaj Vortaroj de la Akademio, en Esperanto Press, Bailieboro/Ontario, Kanado.

Ĉiu lingvo en la mondo evoluas. Jaron post jaro ni estas spektantoj de tiu nehaltigebla proceso de la evoluo. Volenevole ni estas atestantoj de ĉiamaj ŝanĝiĝoj en nia gepatra lingvo: novaj vortoj, tiuj — en Esperanto plej ofte tiel terure kondamnitaj — neologismoj, subite ekestas, sporade aŭ amase, depende de la tereno aŭ profesia fako en kiu ni troviĝas. Ĉu ni bonvenigas ilin aŭ ne, tio ne gravas, ili ĉeestas ĉirkaŭ ni, en la buŝoj de niaj apuduloj kaj . . . finfine ni mem ekuzas ilin. Kelkaj novaj vortoj nur vegetas kaj tre baldaŭ, ofte eĉ efemere, refalas en la abismon de forgeso. La leksiko estas tiu histo de la lingvo, kiu estas kvazaŭ la termometro indikanta ŝveleman vivopovon aŭ marasman mortemon de iu lingvo. Lingvisto, kiu observas tiun ĉi histon povas palpi la pulson de la lingvo.

Gramatikaj strukturoj ja ankaŭ ŝanĝiĝas, sed ili estas multe pli flegmaj . . . daŭras jardekoj, plej ofte jarcentoj ĝis kiam iu tia strukturo efektive transiras al alia.

Sed la leksiko estas la gradometro de evoluinteco aŭ stato de subevoluo. Ankaŭ en planlingvo kia estas Esperanto. Esperanto estas kvazaŭ iu mikrostrukturo de tiu aŭ jena granda nacia lingvo. Eĉ kiam la superpotenca lingvo angla preme torentas en la leksikon de la eŭropaj, sed multe pli en la vortostokon de la afrik-aziaj lingvoj, tiam Esperanto ĝis nun ĉiam trovis, inĝenie, vojojn por iom bloki tiun ĉi alfluon.

Sed nur naivulo asertus: Esperanto estas lingvo sen problemoj. Estas sufiĉe multe da ili. Kaj solvendaj ili estas, nepre! En „Akademiaj Studoj" (1983), paĝo 63, aperas ekzemple represo el la julia-aŭgusta numero de „esperanto", artikolo de Bernard GOLDEN (Hungario) titolita ‚Normlingvo aŭ dialekto — kian Esperanton instrui?'. La norvego, specialisto en matematiko, Olav REIERSØL, prezentas, sur paĝoj 74 kaj sekvaj, interesan kaj ege valoran artikolon ‚Matematikaj kaj statistikaj terminoj en Esperanto. Suplemento al PIV.'

Profesoro Bruce Arne SHERWOOD de Carnegie-Mellon University en Pittsburgh, Usono, diskutas la demandon pri ‚Komputila traktado de Esperanta teksto'.

Listigi en ĉi tiu recenzo ĉiun temon kaj ĉiun verkinton kondukus tro malproksimen. La skalo de la traktata problemaro estas vasta. Vi eble demandos: Kial do Akademiaj Studoj? Tiun ĉi saman demandon prezentis al si la iniciatinto, s-ro EICHHOLZ, mem. Enkonduke li skribas (mi citas): „Ĉi tiu kolekto de lingvaj studoj pri la plej diversaj temoj aŭ problemoj en nia lingvo celas ne nur faciligi interŝanĝon de ideoj kaj opinioj inter la membroj de la Akademio de Esperanto, sed ankaŭ ebligi al la interesita publiko observi tiun opini-interŝanĝon kaj eĉ aktive partopreni ĝin".

Do, ankaŭ ne-Akademianoj estas invitataj kontribui al tiu ĉi publikaĵo. Kaj ke fakuloj, esperantologoj, specialistoj el diversaj terenoj eluzis tiun ŝancon montras rigardo sur la tabelojn de enhavo de ambaŭ kajeroj de Akademiaj Studoj. En la 1983-a numero el 12 kontribuintoj sep estas ne-membroj de la Akademio de Esperanto, kaj en la 1984-a numero el 15 aŭtoroj eĉ 11 estas spertuloj ekstervice de la Akademianaro.

Laŭ mi, tiu ĉi rilatumo ne estas pozitiva. La esperantistaro ekspektas de sia Akademio de Esperanto pli da libera forumo, kaj ĝuste tia volas esti la Akademiaj Studoj de Eichholz. Tial la recenzinto aparte bonvenigas la demarŝon de s-ro Rüdiger EICHHOLZ el Kanado.

La „Akademiaj Studoj" n e estas oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto, sed ĝi j e s estas instigilo al fruktodona kaj aktuala debatado pri solvendaj problemoj de la Lingvo Internacia. Ĉar: ĉiu lingvo evoluas!

Dr. phil. Erich-Dieter KRAUSE
Karl-Marx-Universitato Leipzig
sekcio de afrikaj kaj aziaj lingvoj

Elem, Janos: Betonterapio. Teatrajo. Trad. P. A. Rádos. Dulingva eldono. Hungara Esperanto-Asocio 1985. 35 pĝ.

Iuj homoj jam havis ŝancon rigardi tiun teatraĵon, kies teksto aperis broŝure ĉe HEA. Mi nur povas esperi, ke spektanto pli facile povas kapti la sencon aŭ malsencon de la artaĵo. „Betonterapio" estas absurda teatraĵo, kaj „absurda" laŭ PIV signifas „kontraŭa al komuna saĝo" kaj „ofendanta la regulojn de la logiko", kun komparaj indikoj al sensenca, idiota, kontraŭsenca kaj kontraŭracia. Nu, „Betonterapio" ŝajnas al mi ĉia ekvivalente. La presaĵo estas dulingva (hungara kaj Esperanta), kaj sur la 15-paĝa Esperantlingva teksto dialogas fleganto kaj flegato dum terapia okupado en mensmalsanulejo. Kelkfoje mi dubis, kiu estas la mensmalsanulo, aŭ ĉu eble tute ne estas malsanulo, sed por ĉesigi la aferon la flegato en interkonsento kun sia viktimo enbetonigas la fleganton skulbtante. Iam tiam mi ekis trovi kaj kompreni politikan aŭ humanisman mesaĝon de la verkinto, sed postlege mi konstatis ties kompletan mankon. HEA per tio ne riĉigis la Esperantan literaturon. **Michael Lennartz**

Varbu por „Saksa Kuriero"

Por transsalti financajn hurdojn „SK" bezonas pli da pagantaj abonantoj! Ekde 1987 ni plialtigos nian eldonkvanton, por atingi pli da legantoj kaj enspezi pli da mono. Tial jam nun varbu por „SK" abonantojn! Mendantoj skribu al Literatura Debito, Jacobstraße 9, Leipzig, DDR-7010! Tuj!

Recenzoj

Becklann, Karl: Esperanto. Einführungskurs. Österreichisches Esperantoinstitut. Wien, 1984. 87 paĝoj.

La enkonduka lernolibro kompilita laŭ la Viena telefona Esperanto-kurso de la jaroj 1981 — 1983 prefere estas destinita por aŭtodidaktoj. La aŭtoro substrekas, ke la lernontoj ne bezonas iujn ajn antaŭkonojn surkampe de gramatiko kaj fonetiko — sed tiu ĉi promeso estas interrompata jam per la unua esperantlingva frazo komence de la unua leciono: Klarigoj pri la prononco de la konsonanto „v" (ekzemple) troviĝas pli poste, nur en la tria leciono.

Ĉiu de la dudek du lecionoj enhavas unue klarigojn pri lingvaĵoj (ekz. posedaj pronomoj, la tri pasivaj participoj, la gerundioj) kaj due vortformajn aŭ frazformajn realigaĵojn. Menciinde estas, ke la lernanto ĉiam atentigatas al komparo inter la germana lingvo kaj Esperanto.

Kiel aldonon oni trovas sur la paĝoj 76—83 mallongajn dialogojn (ekz. pri novaĵoj el gazetoj, pri vetero, vojaĝo per trajno, pri malsano), liston da ofte uzataj mallongigoj kaj modelojn por privataj leteroj.

Entute la libro estas konstruita laŭ gramatika instruvojo; ene de la lecionoj ne troviĝas koheraj tekstoj, kiuj estus donantaj al la leganto pli multe ol nur Esperanto-konojn. La rolo de la prefikso „mal-" (p. 30) laŭ mia opinio estas troigita, ĉar ne ĉiam tiu ĉi prefikso montras la rektan kontraŭon de la radiksignifo (komparu la formulon en PIV: „Sed ĉe la proprasencaj adjektivoj ĝi signas nur pli fortan neadon."). La skribmaniero de „ĉi" kunlige kun „tiu, tio, tie" ne estas unueca — ĉu per streketo aŭ sen? (Komparu la paĝojn 36 kaj 39.)

Enhavtabelo kaj leksika respektive gramatika indekso mankas. **T. Dahlenburg**

Daniela DENEVA: Esperanta-bulgara-rusa Matematika terminaro.
Sofio: Bulgara Esperantista Asocio 1985

En la enkonduko la aŭtorino bedaŭras la mankon de fakaj terminaroj en Esperanto sur la scienc-teknika kampo.

La aŭtorino nun prezentas malgrandan trilingvan matematikan terminaron speciale por specialistoj el orienta Eŭropo, uzantaj slavajn lingvojn.

Certe oni bezonas tiajn terminarojn kaj oni devas laŭdi la aŭtorinon pro ŝiaj klopodadoj. La terminaro enhavas 753 terminojn. Preskaŭ ĉiuj terminoj estas matematikaj terminoj, nur kelkaj estsa fizikaj aŭ kristalografiaj. Ŝajnas, ke la aŭtorino faris elekton inter la terminoj iomete arbitre. Tre specialaj terminoj troviĝas en la libreto, sed gravaj aliaj mankas. Ĉu la nombro de terminoj ne sufiĉas? La libro enhavas nur malmultajn erarojn aŭ preserarojn. La vorto 285 „horda" estas malkorekta, la ĝusta estas „kordo".

En nova eldono la terminaro enhavu pli sisteme elektitajn terminojn. Se la nombro estus limigita, oni forigu malofte uzatajn terminojn.

La „Matematika Terminaro" de Daniela DENEVA estas ankaŭ kune kun aliaj (neesperantaj) multlingvaj terminaroj tre utila kaj taŭga libro. **Dr. Helmut Werner**

Masaji IUAKURA: La tago de senaeriĝo
Trad.: Sejŝro NOMBRA
Eldonis: Biblioteko Kolombo, 12 x 18, 78 p., ilustrita

La aŭtoro, preskaŭ tiel aĝa kiel nia jarcento, memoras la proksimiĝon de la kometo Halley al la Tero en la jaro 1910, kio kaŭzis sufiĉe da tumulto ĉe la homoj. Tion spegulas la du verketoj en tiu libro, „La tago de senaeriĝo" kaj „Bubo ĉiam maltrankvila".

Ĉe ni multe da homoj timis la finon de siaj vivoj pro la detrua kraŝo de Halley kontraŭ nia Tero. Masaji Iŭakura priskribas, kiel ruza fabrikanto de aertuboj „inventas" kvinminutan senaeriĝon, por ke la homoj aĉetu liajn aertubojn. Tiu truko eĉ sukcesis.

La dua rakonto temas pri knabo, kiu suferis pro paranojo (psikozo, nervomalsano, kiu povas koncerni nur limigitan temon, lasante normala la menskapablon por la ordinaraj vivbezonaj — S. N.). Dum longa tempo lia malsanstato ne estis sufiĉe atentata de liaj proksimuloj. Tamen la fino de la historio lasas la leganton, suferante kun la knabo, ree libere spiri.

La lingvo estas flua, agrable legebla. Interesa ankaŭ estas la japana medio, en kiu rolas la du rakontoj.

Legendas ankaŭ la „vortoj de la aŭtoro", per kiuj ni konatiĝas kun engaĝita batalanto por la paco. Li „travivis la suferon de inferoj en Hirošima kaj Nagasaki" kaj rekonas kiel urĝan problemon la mortdanĝeron pro la „konkuro de nuklea armado kaj nukleaj militoj", fare de la „homaro mem".

Nu, mi ne dirus „homaro", ĉar ja fakte temas pri relative malmulte da militinstigantoj, kiuj en kelkaj kapitalismaj ŝtatoj decidas la politikon de la koncernaj registaroj. Ni nur memoru Krupp, Hugenberg, Stinnes, Flick kaj kelkajn aliajn, kiuj decidis pri la decidoj de l' imperiestro germana, ni memoru (ree) Flick, Glöckner kaj la tutan „Rat der Götter" (konsilio de la dioj), kiuj nutris la naziajn organizojn kaj unuavice respondecas pri la dua mondmilito, kaj ankoraŭ Flick (intertempe la plej riĉa miliardulo de FRG), kies tankojn, bombaviadilojn ktp. vi trovas ĉie en la mondo, kie popoloj defendas sin kontraŭ la reakcio. Pri la usonaj „samideanoj" de Flick, ktp. legu en PACO, GDR-eldono 1984, p. 4 kaj 9!

Resume, mi kore rekomendas la verkon.
Ludwig Schödl

A. Gramsci, Notizen zur Sprache und Kultur, Gustav Kiepenheuer Verlag, Leipzig 1984

[Vidu „der esperantist" 131 (3/89), p. 65/66]

La signifo de Antonjo Gramsci (Antonjo Gramŝi) por la komunisma movado itala kaj internacia estas sufiĉe konata kaj en Italujo kaj eksterlande kaj mi ne intencas paroli pri ĝi en ĉi tiu recenzo.

La signifo de Gramsci por lingvosciencistoj estis nur lastatempe iom pli vaste konigata, kaj la ĉi tie recenzata libro estas unu el tiuj, kiuj aparte analizas la verkojn de Gramsci pri lingvo kaj kulturo.

Ankaŭ en Italujo mem la unua kohera pristudo de Gramsci kaj liaj ideoj pri lingvoj kaj kulturo aperis nur en 1979-a (Franco Lo Piparo, **Lingua intellettuali egemonia in Gramsci,** Laetrza, Bari 1979), kvankam kompreneble disaj notoj estis kolektitaj kaj aperigitaj tre pli frue.

La konkludoj de la lingvistoj okupiĝantaj pri li — unu el ili estas Klaus Bochmann, prizorginto de la recenzata libro — estas sufiĉe unuecaj. Ĉiuj substrekas ke lia plej interesa kontribuo estas la kunligo de la lingvo kun la socio, kiu parolas ĝin. Iusence Gramsci tre frue rekonis tion, kio nun estas komuna scio de socilingvistoj, tio estas ke la sorto de lingvoj dependas de la sorto de la homoj, kiuj parolas ilin.

En aliaj vortoj Gramsci tre klare priskribis la fenomenon laŭ kiu la lingvo de la reganta klaso fariĝas la reganta lingvo.

Tio ne ŝajnu malgranda mensa antaŭen-salto. En la epoko kiam Gramsci studis filologion, oni ankoraŭ rigardis lingvojn kiel ion enfermitan en si mem, kiel ion ekstersocian, kiel ion obeantan la blindajn leĝojn de vokalŝanĝiĝoj. La tiamaj oficialaj lingvistoj apenaŭ ekinteresiĝetis pri la fakto, tamen praktike konata al ĉiu, ke krom la norma, literatura variajo de la lingvoj ekzistas pluraj lokaj variojoj, alivorte pluraj dialektoj efektive uzataj de la homoj.

Gramsci, ĉefe ĉerpante ekzemplojn el la lingva historio de Italujo, montris ke lingvaj fenomenoj (disvastiĝo, maldisvastiĝo, enpreno de neologismoj, ktp.) estas sekvoj de aliiĝoj en la socio, de ŝanĝiĝoj en la produkto-rilatoj, de ŝanĝiĝoj en la potenco de unuopaj grupoj.

Alia grava kontribuo de Gramsci, kiun ne eblas pritrakti ĉi tie, estas lia klara analizo de la rolo de intelektuloj en la socio (kiu utiligas ilin, kiun ili pensas servi, kion la ceteraj homoj pensas pri ilia rolo). Kaj kompreneble kun tio iras analizo de la ĉefa rimedo uzata de intelektuloj, tio estas la lingvo.

Aliflanke Gramsci, kiel ĉiuj objektivaj lingvistoj interesiĝantaj pri li montras, ne tute eskapis la prilingvajn ideojn, kiuj regis en la komenco de la jarcento en intelektulaj rondoj. Malgraŭ lia enorma kritika kapablo, li restis sub la influo de lingvo-estetikistoj, kiuj regis en Italujo en tiu periodo, almenaŭ en kelkaj marĝenaj kompoj kaj eventuale nur dum difinita periodo.

Tio klarigas frazojn de la speco: „Lingvo ne estas nur komunik-rimedo: ĝi estas antaŭ ĉio artaĵo, beleco . . ." (1).

Ili ŝajnas laŭvorte transprenitaj de la verkoj de Benedetto Groce (Bendeto Kroĉe), la filozofiisto plej fama en Italujo en la komenco de la jarcento (2).

Tiujn konceptojn, kiujn nun ĉiuj agnoskas eraraj, Gramsci tre volonte uzis, kiam li troviĝis antaŭ la praktika bezono polemiki kun esperantistoj.

Fakte dum la jaroj tuj antaŭ la jaro 1920-a, kiam Gramsci estis redaktoro de socialismaj gazetoj en Norda Italujo, aktivis el la tiama socialisma partio forta nombro da esperantistoj, kiuj ree kaj ree postulis apogon de Esperanto fare de la partio. Kelkaj el ili plurfoje ankaŭ faris ion. Kelkaj deputitoj faris pridemandadon en la parlamento pri la internacia lingvo. La socialisma urbestro de Milano enkondukis Esperanton en la lokajn lernejjojn, ktp.

Ĝenerale la amikoj de Esperanto apartenis al tiu parto de la partio, kiu havis tute malsamajn vidpunktojn rilate al Gramŝi pri la politika situacio, pri la strategio de la partio, pri la signifo de la revolucio en Rusujo, ktp. Fakte en la jaro 1921-a la du partoj dividiĝis en la tiam fonditan komunisman partion kaj en la socialisman partion. Ĉi tiu fakto ne estas subtaksinda. Ofte la polemikoj de Gramsci kontraŭ esperantistoj tuŝis ankaŭ aliajn politikajn ideojn de la kunpolemikantoj.

Kiam temas pri Esperanto mem estas tre klare ke Gramsci apenaŭ sciis ion konkretan pri ĝi kaj ke li rigardis ĝin kiel universalan lingvon de la speco de la filozofiaj lingvoj, fiksitaj unu fojon por ĉiam kaj neŝanĝeblaj. Estas tre klare el liaj artikoloj pri Esperanto ke li tute miskomprenis (aŭ neniam sufiĉe interesiĝis por kompreni) la veran rolon de Esperanto.

La insistaj propagandaj tamburadoj de la tiamaj esperantistoj kaj iliaj eventualaj drastaj asertoj pri la kompleta valideco de Esperanto en ĉiuj situacioj kaj pri la neceso ke la tuta homaro adoptu ĝin kiel unuan lingvon (komparu la ideojn ankoraŭ nun renkonteblajn en SAT-rondoj) certe plifirmigis lin en tiu errara opinio.

En liaj postaj skriboj pri ĉi tiuj problemoj (la famaj kajeroj verkitaj en la faŝisma malliberejo) li jam uzas la vorton Esperanto ĝenerale en la signifo de artefaritaĵo, kiu celas komplete anstataŭigi verajojn. Komparu la frazon presitan sur la kovrilo de la recenzata libro: „Por la esperantistoj de la filozofio kaj de la scienco ĉio, kio ne estas esprimata en ilia lingvo, estas eraro, antaŭjuĝo . . .".

Ĉio ĉi estas eltirebla ankaŭ el la enkonduko, per kiu Klaus Bochmann provizis ci tiun libron, kaj eĉ pli klare el la artikolo de de la sama Bochmann: K. Bochmann, **Antonio Gramscis linguistische Ansichten als Beitrag zur Zeichentheorie,** en **Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikations-Forschung,** 36/1983.

Estas nur bedaŭrinde por la esperantistoj ke okazis tia fundamenta miskompreno inter unu el la grandaj marksismaj intelektuloj de ĉi tiu jarcento kaj la naturo de la internacia lingvo Esperanto, ĉar la kialoj de tiu miskompreno kaj la malpravo de Gramsci rilate al Esperanto estas konataj nur al fakuloj (kaj ne ĉiam) dum liaj drastaj diroj kontraŭ Esperanto estas ofte konataj de pluraj legantoj, kiuj ne havas aliajn informojn kaj restas kun granda misimpreso.

Mi povas bone imagi ke multaj esperantistoj en GDR antaŭ ĉi tiu libro sentas la sanktan fajron ekbruli kaj pretas ekiri al senprepara batalo kontraŭ Gramsci kaj aliaj imagitaj malamikoj. Mi opinias ke la plej bona maniero por reagi estas atenta studado de la libro kaj de aliaj ĉi-rilataj materialoj, kaj sobra reago per faktoj pri la vera naturo de Esperanto. Inundado de homoj (kaj ĉefe de lingvistoj) per lavangoj da verdaj steloj kaj da dogmaj asertoj povas nur kaŭzi kontraŭreagojn de la speco de tiu kaŭzita siatempe ĉe Gramŝi.

Renato Corsetti:

(1) **Contro un pregiudizio,** redaktora noto en **Avanti,** 24 gennaio 1918. Represita ankaŭ en la recenzata libro je la paĝo 44-a.

(2) Komparu: Benedetto Croce, **Problemi di estetica,** kiu aperis en pluraj eldonoj de la jarcento ĝis nun en la itala — kaj verŝajne ankaŭ en aliaj eŭropaj lingvoj. En ĝi estas ĉapitro pri la „universala lingvo", kiu atakas Esperanton preskaŭ per la samaj argumentoj de Gramsci.

Aldono de la redakcio:

Komparu la diskuton pri Gramsci kaj lia rilato al Esperanto en „Sonntag" 1986, n-roj 9, 11, 14, 15

Oljanov, Violin (Kunmetinto): Interlingvistiko. Esperantologio. Bulgara Esperantista Asocio. Sofio 1985. 252 p.

Bulgara Esperantista Asocio eldonis tre bezonatan **de** esperantistoj libron, kiu estas titolita **per** lo vortoj „interlingvistiko, esperantologio" kaj kiu — laŭ **la** intenco de la kompilinto, samideano **Oljanov,** — alcelas plialtigon de lingva nivelo en esperantista medio surtere, aŭ en **Atenoj** aŭ en **Zimbabweo.** La kompilaĵo konsistas el 26 pli-malpli ampleksaj artikoloj, plejparte jam antaŭe publikigitaj en diversaj periodaĵoj, sed nun ili estas je dispono **al** pli grando legantaro kaj servas kiel instigiloj por pli profunde pripensi la **skememon** aŭ la **reformemon** de malsanaj verduloj.

Supre mi substrekis kelkajn vortojn respektive silabojn, ĉar per tio mi volas atentigi la leganton al problemoj, kiuj estas pritraktataj en la menciita libro. La vico de temoj etendiĝas ekde teoriaj starpunktoj koncerne la difinon de la nocio interlingvistiko (Atanasov, Masserov, Ĝuĝev, Verloren van Themaat) tra etimologiaj sugestoj (Duc Goninaz, Pośka, Vaitilavičius, Golden) ĝis praktika lingvouzo surkampe de pasiva konstrumaniero, de toponimiko, de ortografio de personaj nomoj kaj de la apliko de la difina artikolo (Albault, Coburger). Pli kaj pli rimarkeblas la antaŭenigo de konsciaj, sciencaj komparoj inter Esperanto kaj unuopaj etnaj lingvoj por interalie sukcese majstri la instru- kaj lernprocedon kaj por estonte eviti la bedaŭrinde enradikiĝintan „konvinkon", ke nia internacia lingvo kvazaŭ estas facile lernebla (Blanke, Oljanov, Danovskij).

Kiel ruĝa fadeno traserpentumas la libron la plenplane fundamentita aserto, ke Esperanto povas plenumi sian rolon en la diversaj brancoj de beletro kaj fakliteraturo nur, se veraj lingvotalentuloj eluzu modele la riĉajn aplikeblecojn de nia lingvo — same, kiel oni agas enkadre de nacilingva evoluo. Fine kelkaj citaĵoj emfazantaj ĉi tiun impreson:

> „La lingvo ne estas matematiko kaj feliĉe same Esperanto. Alimaniere ĝi prezentus sekan skemaĵon netaŭgan por literaturo, por belartaj figuroj, por elvokivaj bildoj, por esprimo de sentoj, unuvorte ĝi ne estus plenvalora komunhoma interkomunikilo." (p. 94, V. OLJANOV)
>
> „Ne la lingvo donas estetikan valoron al la verko en ĝi koncipita, sed male: la verko mem donas valoron kaj prestiĝon al la lingvo en kiu ĝi estas kreita; t. e. la perfekteco kaj la beleco de la verko ne dependas tiom de la lingvo mem, sed ĝi dependas precipe de la kapablo, de la genio de sia aŭtoro." (p. 50, S. ĜUĜEV)

Kaj kio ne povas kontentigi la interesiĝanton? Ke li nur hazarde povas trovi la bezonatan artikolon, kontribuon, ĉar la enhavtabelo ne indikas la paĝojn.

d-ro Till Dahlenburg

Forpasis Damjanov

La konata bulgara baritona operkantisto Veselin Damjanov forpasis neatendite 60jara la 15an de aprilo 1986 en Sofio. Li ofte kantis dum universalaj Esperanto-kongresoj kaj faris turneojn tra diversaj landoj. Ekzistas kelkaj longdaŭraj kaj malgrandaj diskoj kaj kasedoj.

Tabi, László: La Damo de l'Fatalo. Tragikomedio. Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1985. 44 pĝ... Trad.: Vilmos Benczik.

Tiu komedio vivas ne el diversaj misrekonoj kaj ne el simpla celado de ĉiuj amantoj al feliĉa fino. Kontraŭe, ĝi pulsigas la realan vivon sur la scenejo, ne beligitan, sed iom humurigitan. Estiĝas la impreso, ke la personoj vere vivas, kaj sur la scenejo ili montras la nun bezonatan parton de iliaj vivoj. Daŭre io nervoziga okazas. Eĉ se oni ne kutimas legi dramverkojn, tamen oni ne povas ne finlegi tiujn paĝojn. Krom la enhavo, ankaŭ la bonega traduko far Vilmos Benczik kaptis min. La stilo kaj la parolturnoj fluas kvazaŭ el si mem. Legu du ekzemlpojn: „Li aĉetis perukon, la kreteno... Ĝi sidas sur lia kapo, kiel smokingo sur simio." „Kompare al ŝiaj kurbaj kruroj, du diplomoj ne sufiĉas." La tradukinto perfekte regas la lingvon, kaj ĉi tie ŝajnas al mi necese admiri kaj laŭdi la senlacan, altkvalitan kaj multflankan laboron de Vilmos Benczik. Li estas esperantista redaktoro, kompilinto, tradukisto, komentisto; li laboras, eĉ laboregas ekde minimume tri jardekoj kaj estas unu el la plej diligentaj konstruantoj de la Esperanta kulturo. Jen modelo por ĉies instigo!

Michael Behr

En UNESKO-Kuriero pri Esperanto

La kultura revuo de UNESKO, „UNESKO-Kuriero", aperas en 32 lingvoj. En n-ro 4/86, p. 35, oni legas jenan artikolon:

„UNESKO pledas por Esperanto"

La antaŭstarantan jubileon de la internacia lingvo kaj la neceson de ĝia disvastigo en interŝtataj organizaĵoj kaj en lernejoj de ĉiuj landoj formas la kernon de rezolucio, kiun akceptis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO la 8an de novembro 1985 en Sofio. Per tiu rezolucio UNESKO gratulas la 100an naskiĝtagon de ĉi-tiu lingvo (1987), petas la Ĝeneralan Direktoron plue sekvi la evoluon de Esperanto kiel instrumento de pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj kaj alvokas la membroŝtatojn kontribui al la jubileo per deklaroj, porokazaj poŝtmarkoj kaj per la enkonduko de Esperanto en la instruplanojn. Tio jam estas la dua rezolucio de UNESKO aprezanta la meritojn de Esperanto por la interpopolaj rilatoj, en kies sekvo Universala Esperanto-Asocio ricevis la statuson de konsultanta organizaĵo ĉe UNESKO.

Laste aperis

Bibliografio! Ne librooferto!

— Amo kaj morto en Balio (1937), Vicki Baum (1888 — 1960). El la germana trad. P. H. Mooij. Roterdamo: UEA: 1986. 420 p. 21 cm. ISBN 92 901 7033 6. Sociologie fascina romano pri la tradicia vivo sur la indonezia insulo Balio.

— Barbiro de Sevilla, La, (1775), P.-A. C. de Beaumarchais (1732 — 1799). El la franca trad. (1974) Kiril Darjev (1904). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1985. 64 p. Ilus. 21 cm. Speciala literatura n-ro de Franca esperantisto. Fama kvarakta komedio.

— Bestoĝardeno, Lin Songjing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 72 p. (nenumeritaj). Kolorilus. 21 cm. Ĉiun dupaĝan pentrajon de besto akompanas kvarversa strofo por infanoj.

— Bronza tigro; Historia dramo kvinakta (ĉ. 1940), Gúo Mojúo (Guo Moruo, 1892 — 1978). El la ĉina trad. Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 122 p. Fotoj. Mapo. 22 cm. Bind. Teatrajo pri okazajo el la ĉina historio koncerne la komandon de armeo en la jaro 262 a. K.; kun historia noto kaj biografio pri la aŭtoro, eminenta verkisto kaj arkeologo.

— Fabloj,, G. E. Lessing (1729 — 1781). El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 41 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 13. La koncizaj, pensoklaraj kaj ofte akraj fabloj de Lessing.

— Fiera generalo, La, Húa Ĝjun' u. El la ĉina (1964) trad. Laúlum (Li Shijun). Pekino: Esperanto-Eldonejo, 1985 (2a eld.). 21 p. (nenumeritaj). Kolorilus. 25 cm. Por-infana rakonto pri la malvirto de la fiero.

— Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon, J. Amouroux, M.-T. kaj R. Lloancy. Pradas: Conflent, 1985. 114 p. Ilus. 24 cm. Kompetente produktita franclingva historio pri la loka Esperanto-movado en Roussillon; kun bibliografio kaj indeksoj.

— Fundamenta vortaro naŭlingva, komp. Hakuta Masao. Tokio: Asake-Syoboo, 1985. 820 p. 26 cm. Pli ol 7000 kapvortoj, alfabete ordigitaj laŭ Esperanto, kun precipe unuvortaj tradukoj en la japana (plus oficiala latinlitera transskribo), la franca, angla, germana, pola, hispana, itala kaj nederlanda; kun informoj pri la prononcado de la lingvoj.

— Interlingvistiko, esperantologio, komp./red. Violin Oljanov (1920). Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 251 p. Mimeo. 20 cm. Kolekto de 26 artikoloj de i. a. konataj esperantologoj.

— Iom pri rompumatakoj, J. Novák kaj I. Špička. Prago: Ĉeha Esperanto-Asocio, 1985. 111 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. Gvidilo pri la sindefendaj movoj „rompumoj".

— Izbrannoe, Vasilij Erošenko (1890 — 1952). Red. R. Belousov. El Esperanto, la japana, rusa kaj ĉina en la rusan trad. diversaj. Moskvo: Nauka, 1977. 263 p. Ilus. 21 cm. Bind. Elekto de rakontoj, poemoj, artikoloj, skizoj kaj leteroj, kun rememoroj pri Erošenko i. a. de Lusin (Lü Xin) kaj Hujucz (Hu Yuzhi). Ĉio en la rusa lingvo.

— Kalevala (1835), kolektita de Elias Lönnrot (1802 — 1884). El la finna trad. (1964) Johannes Edv. Leppäkoski (1901 — 1984). Helsinko: Esperanto-Asocio de Finnlando. 1985 (2a eld.). 392 p. Ilus. de Akseli Gallen-Kallela. 22 cm. Bind. Serio Orient-Okcidento, n-ro 4. ISBN 951 9005 51 X. La fama finna nacia epopeo, brile tradukita. Unu el la ĉefverkoj de Eŭropo, kies karakterizo ritmo multe influis poetojn en plej diversaj landoj. La traduko estas formfidela eĉ ĝis la aliteracioj, kaj legiĝas kvazaŭ bona romano.

— Perkomputila tekstoprilaboro, red. Ilona Koutny. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 336 p. Ilus. 22 cm. ISBN 963 571 147 6. Dudek unu studoj aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj; kun ampleksa bibliografio. biografiaj notoj kaj dek paĝoj de resumoj en la angla kaj rusa.

— Resonoj / Nachklänge, Hubert Weinzierl (1935). El la germana trad. Eckhard Bick (1958). uMnkeno: Natur und Umwelt, 1985 (eldonjaro mankas). 63 p. Kolorfotoj de H. kaj B. Weinzierl. 22 cm. Bind. Dulingva: Esperanto-germana. ISBN 3 924 479 05 1. Poemaro pri la naturo kaj medio: profesie produktita.

— Tero de la homoj (1939), A. de Saint-Exupéry (1900 — 1944). El la franca trad. Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 152 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 12. Romano pri la amikeco inter homoj.

— Tiaj ni estas, Sándor J. Bakó. Los-Anĝeleso: Al-Ba, 1965. 252 p. Ilus. 18 cm. Amuzsatira novelaro.

— Unua perbraka blokado/Prvá přídrž, J. Novák kaj I. Špička. Prago: Ĉeha Esperanto-Asocio, 1984. 41 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. Dulingva: Esperanto-ĉeha. Gvidilo pri la sindefenda movo „ango".

— Akvon, mi petas! El la japana trad. Hukuoka Esperanto-Societo. Hukuoka: la tradukintoj, 1984. 64 p. Ilus. de Nakamura Ai. 21 cm. Raportoj pri la nukleaj atakoj kontraŭ Hiroshima kaj Nagasaki.

— Albert Schramm (1880 — 1937) kaj lia korespondado kun Lazaro L. Zamenhof (1859 — 1917), Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 59 p. Ilus. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 3. Kun faksimiloj kaj bibliografio.

— Biografio de duona vortaro; Kiel Esperanto perdis sian gvidantan Esperantologon, Hans Joachim Plehn (1905 — 1985). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 11 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 12. Prelego pri la historio de Enciklopedia Vortaro Esperanto-germana de la esperantologo Eugen Wüster (1898 — 1977).

— Horizonto de Sovetia Litovio, red. O. Deveikiene k. a. Vilnius: Mintis, 1985. 56 p. Ilus. Muziknotoj. Mimeo. 29 cm. 8a kajero. Kolekto de diversaj beletrajoj kaj artikoloj i. a. pri aspektoj de la vivo en Litovio.

— Kantoj kaj romancoj en Esperanto por gitaro; Albumo 1, Dragan Štokić. Trad. Zvonko Rehorić. Zagrebo: la redaktinto, 1983 (2a, tralaborita eld.). 4 + 44 p. 17 cm. Sesdek jugoslavaj kantoj, kun muziknotoj kaj gitarakordoj.

— Language Problem in Tourism, The. Rotterdam: UEA, 1985. 24 p. Ilus. 21 cm. ED-34A.

— Lastaj estas lastaj, La (1966), Aldo Onorati. El la itala trad. G. Lacertosa. Venecio: Mestrina, 1985. 96 p. 22 cm. Aŭtobiografia romano de provizora instruisto.

— Laŭ la sendevia kurso de la paco kaj progreso, M. S. Gorbaĉov (1930). El la rusa trad. L. Novikova kaj V. Aroloviĉ. Moskvo: Novosti, 1985. 31 p. Ilus. 17 cm. Parolado; kun bibliografio.

— Lingva problemo en turismo, La. Rotterdam: UEA, 1985. 20 p. Ilus. 21 cm. ED-22E.

— Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, La, Germain Pirlot (1943). Rotterdam: UEA, 1985 (6a, ĝisdata eld.). 32 p. Grafikaĵo. 21 cm. ED-20E.

— Perkomputila instruado, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1985. 64 p. Ilus. 24 cm. N-ro 6 de Internacia komputado. ISBN 963 571 151 4. Popularaj artikoloj i. a. pri instrusistemoj kaj mikrokomputiloj; kun mallongaj novaĵoj.

— Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto, Olav Reiersøl. Oslo: Universiato de Oslo, 1985. 40 p. 30 cm. ISBN 82 553 0583 1. Kun bibliografio kaj alfabeta indekso de terminoj.

— Skizo pri personeco de esperantisto (pri ĝia virtuala evoluo), Tyburcjusz Tyblewski (1933). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1985. 68 p. Ilus. 20 cm. ISBN 83 7013 019 4. Psikologia studo pri esperantisteco; kun bibliografio.

— Vocabolario esperanto-italiano, Umberto Broccatelli. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1984. 16 + 482 p. 22 cm. Esperanto-itala vortaro kun preskaŭ ĉiuj radikoj de Plena ilustrita vortaro; kun konciza prezento de la gramatiko.

— World Communication Year: Social and Linguistic Aspects of Modern Communications. Rotterdam: UEA, 1985. 16 p. 21 cm. ED-33A. Prelego de Richard E. Butler, ĝen. sekretario de Internacia Telekomunika Unio, en la 86a UK kaj la respondo de d-ro Humphrey Tonkin.

— Bulgara rozo, Jana Cikalova. El la bulgara trad. K. Vâlev. Sofio: Balkanton, 1985. 31 cm. 33t/m, duflanka, stereofona disko. BTA 11659. Dek kvin kantoj el la bulgara.

— Jubilea koncerto, Veselin Damjanov. Sofio: Balkanton, 1985. 31 cm. 33t/m, duflanka, stereofona disko. BOA 11569. Sep popularaj operaj kaj operetaj arioj kaj sep originalaj kantoj; kun tekstoj.

— Voĉo de la popolo; Almelo kantas en Esperanto. Almelo: Esperanta Grupo, 1985. Kaseto kun naŭ kantoj, inkl. de „La espero", „La vojo" kaj „La internacio"; kun presita tekstfolio.

— Life of Zamenhof, The; This Thought and International Language (1920), Edmond Privat (1889 — 1962). En la anglan (1931) trad. Ralph Eliott. Tokio: Daigakusyorin, 1984. 6 + 59 p. Ilus. 21 cm. Koncizigita versio de la biografio Vivo de Zamenhof por japanoj, lernantaj la anglan; kun prilingvaj notoj de Saito Tatio.

— Nekonato: la Zamenhofa homaranismo (1957), André Caubal. Laroque Timbaut: Laŭtel, 1985. 15 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. SAT-Broŝurservo. Represo de artikolo el Sennacieca revuo.

— Plena analiza gramatiko de Esperanto, (1935), K. Kalocsay (1891 — 1976) kaj. G. Waringhien (1901). Rotterdam: UEA, 1985 (5a, korektita eld.). 698 p. 22 cm. Bind. Jubilea Kolekto Jarcento de Esperanto, n-ro 2. ISBN 92 9017 032 8. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo de la guŝta uzado de la Internacia Lingvo. La normverko sur sia kampo.

— Skizo por racia teorio de vortigado, F. Garcia Blázquez. Karako: la aŭtoro, 1985. 71 p. 21 cm. Provo ellabori novan vortforman teorion de Esperanto pli akceptebla ol la ĝisnunaj.

— Vortoj kun flugiloj: Citaĵoj el la tuta mondo, komp. Ralph Harry. Kanbero: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1984 4 + 64 p. Mimeo. 21 cm. Kolekto de internacie konataj citaĵoj, ankaŭ el Esperanto, kun tema indekso.

TRADUK-KONKURSO 1985

25 personoj, inter ili 3 eksterlandanoj, partoprenis la „traduk-konkurson" en la jaro 1985. Ni tre kore gratulas al geedzoj Plümecke el Magdeburg, kiuj en komuna laboro gajnis la konkurson. Sed nia gratulo iras ankaŭ al ĉiuj aliaj, kiuj penis laŭ siaj spertoj kiel eble plej bone solvi la donitajn taskojn.
Jen la plej bonaj de la tutjara konkurso:

1. E.+H. Plümecke
   — Magdeburg
   — 215 poentoj
2. Gerh. Hornbogen
   — Weimar
   — 212 poentoj
3. Otto Möller
   — Heiligenstadt
   — 204 poentoj
4. Gerda Häusler
   — Magdeburg
   — 198 poentoj
5. Bert Schumann
   — Mittweida
   — 182 poentoj

Estas bedaŭrinde, ke nur malmultaj uzis la eblecon per helpo de nia konkurso iomete pli profunde okupiĝi pri la lingvo kaj kompari sian lingvoscion kun aliaj. Tute mankis ankaŭ partopreno de kolektivoj. Ĉu tia konkurso ne taŭgas por komuna tradukado dum grupaj kunvenoj? Ĉu la taskoj eble estis tro malfacilaj? Ni ŝatus ekscii vian opinion.

Dieter Berndt

13. Jugendseminar in Lychen

Es findet vom 12. (Anreise) — 17. (Abreise) Oktober 1986 statt. Teilnehmen können junge Esperantisten (Mindestalter 18 Jahre), die bereits über Esperanto-Kenntnisse verfügen und Erfahrungen in der praktischen Arbeit haben. Das Seminar bietet vormittags praktische sprachliche Übungen und behandelt nachmittags Probleme der Ziele, Struktur und Tätigkeit nationaler und internationaler Esperanto-Verbände, der Informationstätigkeit zum Esperanto, der Pressearbeit, der Vorbereitung und Durchführung internationaler Veranstaltungen und andere praktische Fragen der Arbeit junger Esperantisten im Kulturbund der DDR.
Anmeldungen sind ab sofort zu richten an den Esperanto-Verband, Charlottenstraße 60, Berlin 1080.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Argentino

21j. studento de filozofio k. klasika literaturo dez. kor., kol. pm, bk: Atilio Orellanan Rojas, C. C. 1428, **5000 Cordoba**

Belgio

15j. komencantinoj dez. kor. kun gejunuloj samaĝaj. Skribu al: Esperanto, Kastanjeweg 33, **2850 Keerbergen**

Ĉeĥoslovakio

Dez. kor. Jiři Tye, Famírova 26, **318 09 Plzeň** (50j.)

E-klubo de KdSS aranĝos letervesperon Bv. sendi bk, leterojn, esperantajojn. Ĉiuj ricevos dankresp. Adreso: Park pasáž 1721, **92101 Piešťany**

Juna montarturisto serĉas gajan samideanin-non el GDR, 18—35j. k. geamikcjn tutmonde, kol. bk., turismajn prospektojn k. a.: František Roušar, Za sokolovnou č. 82, **569 82 Borová u Poličky**

GDR

Ursula Schumann, **1244 Hangelsberg,** Steinstr. 4, (64j.), dez. serioze kor. tutmonde p. ĉ. t.

Em. instruistino por franca k rusa lingv. dez. kor.: Ingeborg Matthes, **1313 Wriezen,** Frankfurter Straße 39

44j. ekonomiistino dez. kor.: Monika Hippe, **1313 Wriezen,** Frankfurter Str. 13

Carola Schüler, **1313 Wriezen,** Poststr. 4, (40j.), dez. kor. p. ĉ. t.

Ingrid Franz, **1313 Wriezen,** F.-D.-Str. 16, (47j.), dez. kor. pri muziko, literaturo, vojaĝoj

27j. maŝinisto dez. kor. tutmonde: Wolfgang aBumgart, **4500 Dessau,** Heidestr. 49

Peter Bielack, **2553 Graal-Müritz,** E.-Thälmann-Str. 49 (29j.), dez. kor. k geedzoj tutmonde, kol. bk

Heike Schüssler, **2042 Dargun,** Heinrich-Mann-Str. 2, dez. kor. tutmonde pri muziko, E-movado k vivo en aliaj landoj

21j. kemiisto dez. kor. tutmonde pri fotografado, literaturo, kol. bk: Dieter Wilke, **1330 Schwedt/O.,** Am Stadtpark 2/421

La esperantista junulargrupeto en Leipzig alvokas ĉiujn esp. traduki popolajn fabelojn k sendi ilin al: Kulturbund der DDR, Bezirksleitung Leipzig, Jugendgruppe Esperanto, **7010 Leipzig,** Käthe-Kollwitz-Str. 115.

Ĉiujn tradukaĵojn ni uzos por pliriĉigi niajn aranĝojn, kelkajn ni aperigos en „Saksa Kuriero" k multajn ni premios per jarabono de tiu ĉi leginda esperantlingva ĵurnaleto. Respondon ni garantias.

Irano

18j. komencanto dez. kor. k. gejunuloj el GDR p. ĉ. t.: Vahid Baghai, P. O. Box 1833, **71365 Shiraz**

Pollando

23j. studentino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Beata Świderska, ul. Sowinskiego 38, **20 612 Lublin**

Hanna Wakynkiewicz, ul. Staszica 19 m 21, **60-526 Poznań,** (28j.), dez. kor. kun germanaj geesp. pri vojaĝoj k. muziko

27j. oficistino dez. kor., kol. bk, diskojn, E-librojn: Krystyna Mamok, ul. Zawadskiego 12/150, **43-100 Tychy**

17j. junulo dez. kor. kun geknaboj el GDR pri sporto, historio, biologio, geografio: Zbigniew Wozniak, Myców 8/1, **22-543 Chłopiatyyn,** woj. Zamość

Gelernantoj 16-17j. dez. kor. (kol. aŭ indiv.) kun gelernantoj tutmonde pri muziko, filmo, sporto, historio, turismo, filatelo, kol. bk. Skribu al Wiesław Stanichi (instruisto), Liceum Ogolnoksztalcoce, **07-130 Łochów**

Komencantoj, mgr. Bronisław Kiler k. edzino, ul. Sadowa 3 m. 4, **50-046 Wrocław,** dez. kor. kun esp.-familio el Berlin

Irene Pionka, ul. Dluga 122, **32-300 Olkusz** woj. Katocickie, (19j.) dez. kor. p. ĉ. t., kol. bk

18j. junuloj dez. kor. pri sporto, turismo, poezio, historio, literaturo, muziko:

— Robert Plewka, ul. Rynkowa 2, **58-305 Wałbrych,**

— Dariusz Olejniczak, ul. Fredry 10/2, **58-301 Wałbrych**

23j. komencanto dez. kor. pri literaturo, lingvoj, muziko: Marian Pauliszyn, **67-115 Bytom Odrz.,** Mlynska 26

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16